

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA

N-ro 614 (1)

Januaro 1957



**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)

Omaĝe al UNESKO



Foto: J. Casey

Laŭ la instigo de UEA multaj landaj asocioj kaj lokaj grupoj celebris la 10-an datrevenon de UNESKO. La Londona Esperanto-Klubo aranĝis kunvenon la 2-an de novembro. Dum la kunveno estis prezentitaj filmstrioj, kiuj ilustras la laboron de UNESKO, dum la murojn ornamis dekduo da afiŝoj. La filmstrioj estis havigitaj de la Brita Asocio por Unuiĝintaj Nacioj.

Sinjoro Gething, la prezidanto de la Klubo, klarige komentis dum la montrado de la filmstrioj, kaj proksimume 60 ĉeestantoj varme aplaudis la strebojn de UNESKO en diversaj partoj de la mondo. Gratula letero en la nomo de la Klubo estis poste sendita per aerpoŝto al la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, tiam en New Delhi.

La foto montras de maldekstre, la ĝeneralan sekretario de UEA, Prof. I. Lapenna, la prezidanton de la Londona Klubo, s-ro W. A. Gething, kaj la vicprezidanton de UEA s-ro H. Holmes, O.B.E.



ESPERANTO

Januaro 1957

Revuo Internacia

N-ro 614 (1)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O)

Fondinto: H. HODLER

* * *

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

* * *

Cion por la redakcio oni sendu al la

Redaktoro: Mag. W. AULD

Knockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrewshire, Skotlando.

* * *

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Girkonto: 378964.

* * *

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1957): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 10 n.gld.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo	128.— gld	1/2 paĝo	64.— gld
1/4 paĝo	32.— gld	1/8 paĝo	16.— gld
		1/16 paĝo	8.— gld

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkuponon por ĉiu duon da vortoj.

Legantoj en 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

P. M. Mabesoone, vic-prezidanto, estrarano pri financoj, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O, Nederlando.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri kongresoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex Britujo. Telefono: ARNold 90-81.

ENHAVO

Pli da delegitoj! <i>Le Prezidanto</i>	1
La kampanjo de la jaro	1
Helpu al la hungaraj rifuĝintoj	2
La esperantista junularo. <i>I. Lapenna</i>	4
Fajraĵoj en la nokto. <i>M. Ramperti</i>	6
<i>Vagado dum la kursotempo. F. Mistral</i>	8
Komuniko de la Estraro	10

Rubrikoj

La Juna Vivo	3
------------------------	---

Niaj Konkursoj	4
Esperantista Vivo & Nekrologo	4
Tra la mondo	5
42a U.K.	9
Belarta Konkurso 1957	10
Novaj Libroj	11
Radio	13
CED	14
Oficiala Informilo	15
La Internaciaj Konkursoj . . . kovrilo	4

PLI DA DELEGITOJ!

Novjarsaluto de la Prezidanto de U.E.A

Ĉiu tago estas egala al alia tago, tamen venas la momento en kiu, laŭ informo de la kalendaroj, ni povas diri: jaro finiĝas kaj nova jaro komenciĝas! En tiu okazo en mia lando, kaj eble ankaŭ en aliaj, oni ofte aŭdas la diron: „Nova jaro, nova vivo“.

Laŭdinda promeso fiksi netan startpunkton por plibonigo de nia konduto, por la forlaso de ĉiuj malvirtoj, por la korektado de eraraj sintenadoj.

Ĉu ankaŭ ni esperantistoj devas proponi al ni „novan vivon“ okaze de la nova jaro?

Mi kredas ke ne. Ni ne estas tiel malvirtuloj, ke ni devas fari grandajn ŝanĝojn en nia ĉiutaga agado. La lastaj jaroj alportis al ni sufiĉe da sukcesoj, kaj klare montris al ni promesplenajn irvojojn por nia agado, tiel ke ni povas rajte opini esti sur la bona vojo kaj ke al ni necesas nur persisti en nia laboro.

Ankaŭ la teknikaj rimedoj pliboniĝis lastatempe. La starigo de nova oficejo de U.E.A. en la centro de granda urbo, facile atingebla de la ĉefaj landoj, kie vigliĝas la movado, la bone funkcia Centro de Esploroj kaj Dokumentado, al kiuj, per libervola monokolekto, oni estas donantaj la novajn necesajn oficmaŝinojn, la plibonigita aspekto de nia revuo ESPERANTO, jen la bazoj sur kiuj ni povas konstrui nian morgaŭan laboron.

Se iu malvirto ekzistas inter ni esperantistoj, kiun ni devas, laŭ novjara promeso, klopodi forjeti, estas la emo al individua kaj disa agado, al izola iniciato, kiu volas sin trudi al ĉiuj, ne konsiderante ĉu fakte ĝi estas por ĉiuj oportuna, kaj ĉu ĝi povas trovi la necesajn rimedojn.

Ŝajnas al mi ke ĉiu esperantisto povas jam trovi sufiĉan kampon por sia poresperanta aktiveco, realigante en sia propra urbo, en sia lando, la diversajn erojn de la baza programo, aprobata en Kopenhago kaj publikigita en la dua parto de nia Jarlibro 1956. Ni bone trastudu tiun programon, kaj ni promesu al ni, ke dum la tuta jaro ni faros nian eblon por ĝia plenumo, kiom pleje ni povos.

U.E.A. montris en la lastaj monatoj kreskon de sia anaro, kompare kun la pasintaj jaroj. Ni insistu en tiu direkto: estu por ni morala devo dum 1957 havigi novajn anojn al nia Asocio. Ĉu vi povas imagi kion ni povos atingi, kiam ni estos pli multnombraj, se jam ni atingis bonajn rezultojn, estante kiel nun nur malgranda nombro?

Precipe ni devas pligrandigi la reton de niaj Delegitoj ordinara kaj fakaj. Mia longjara sperto pri la psikologia efiko ĉe la ne-esperantistoj, montris al mi ke ĉiam favore impresas la prezentado de nia Jarlibro kun la listo de la Delegitoj. Ili montras la realecon de la disvastigo de nia movado. Do ni klopodu per ĉiuj niaj fortoj plialtigi la efikon de tiu listo, per ĝia pliampleksigo.

Ĉiu el ni konas en sia lando, aŭ per korespondado ankaŭ eksterlande, la adreson de esperantistoj loĝantaj en loko, kie tamen ne estas Delegito de U.E.A. Ni instigu ilin partopreni al nia laboro, al nia movado, ne nur ideale sed per materia kunlaborado, pere de aliĝo kaj delegiteco.

Do, se ni volas doni al ni specialan sloganon por la nova jaro, ĝi estu: „Pli da Delegitoj de U.E.A. en 1957!!!“

Karaj kunlaborantoj, je Novjaro estas kutime prezenti bondezirojn. Vi facile komprenas kiuj estas la elkoraj bondeziroj de mi sendataj al vi, al viaj familianoj: ke vi havu nur feliĉajn tagojn dum la tuta jaro, ke la nigraj nuboj minacaj, amasiĝintaj lastatempe super niaj kapoj, ne alportu al ni novan teruran ŝtormon, sed ke ili malaperu kaj rebrilu la ĉielo per la mildaj radioj de paca suno.

Giorgio Canuto

La kampanjo de la jaro Ĉiu kunlaboru en la varbado de apogantoj!

En Melbourne okazis la Olimpiaj Ludoj. Perfekta okazo por grandstila laboro por Esperanto. Bedaŭrinde malmulto estis farebla pro la manko de financaj rimedoj. Formiĝas polica forto de Unuigintaj Nacioj. Denove bonega okazo por efike atentigi pri la Internacia Lingvo. Manko de financaj rimedoj malebligas ankaŭ tion. Surbaze de la konata Rezolucio de UNESKO, kaj en la kadro de la konsultaj rilatoj kun tiu Organizaĵo, UEA havas la eblecon multe pli efike aŭdigi sian voĉon, se ĝiaj materiaj kondiĉoj permesus tion. Fakte, la Asocio havas observanton en la Generala Konferenco de UNESKO en New Delhi nur dank' al senĝina oferemo de Lic. Tibor Sekelj, kiu veturis tien je propraj kostoj kaj al kiu oni povis doni nur ridinde malaltan subvencieton. Per grandaj streĉoj ni sukcesis organizi la universalan ekspozicion kaj elmontri ĝin en Montevideo, en Strasbourg kaj en Kopenhago. Ĝi devus esti konstante elmontrata jen en tiu, jen en alia urbo. Ankaŭ en tiu ĉi afero la manko de mono malebligas plenan utiligon de la eblecoj.

Ni menciis nur kelkajn ekzemplojn. La Movado estas devigata preterlasi amason da okazoj por efika disvastigo de la lingvo, ĉar ĝi ĉiam frontas la saman problemon: mankon de financaj rimedoj.

Estas necese rekoni, ke en la lastaj jaroj la Asocio plurfoje turnis sin al la esperantistaro kaj petis ĝin kontribui por tiu aŭ alia celo. Tiaj alvokoj ne restis senehaj. Dank' al oferemo de multaj geesperantistoj estis eble atingi kelkajn gravajn rezultojn. Aliflanke la celtrafa laboro de UEA altiris al la Asocio multajn novajn membrojn, kio plibonigis ĝiajn financojn kaj plifortigis ĝian prestiĝon. Tamen, ĉio ĉi tute ne sufiĉas por plenumi la ĉiam pli ampleksajn laborojn, antaŭviditajn en la Baza Laborprogramo.

Ni nun havas bonegan organizon. Sen troigo oni povas diri, ke ĝi estas la plej perfekta el ĉiuj neregistaraj internaciaj unuigoj. Ni havas oferemajn, sindonajn kaj talentajn laborantojn. Kion ni malhavas, estas materiaj rimedoj. Sen ili estas neimagebla vere grandskala progresado de nia afero en la sekvantaj jaroj.

La solvo de tiu ĉi brulanta problemo, la ĉefa en la nuna momento, troviĝas en niaj propraj manoj. Laŭ la nuna Statuto de UEA, ĉiu persono, kiu aprobas nian aferon, povas fariĝi apoganto. Apoganto, kiel diras la vorto mem, apogas la celojn de la Asocio kaj pagas unufoje por ĉiam la minimumam kotizon de 5 ned. guldonoj aŭ proksimuma egalvaloro en rondaj ciferoj por aliaj landoj. Ĉiu apoganto ricevas specialan numeritan atestilon kaj estas registrita en la Oficejo de UEA.

Apoganto ne estas esperantisto, nek fariĝas membro de la Asocio, nek havas iajn ajn rajtojn en ĝi. Apoganto per sia kontribuo nur helpas la celojn de UEA kaj ĝian laboron por Esperanto.

Ĉiu, absolute ĉiu esperantisto kaj esperantistino devus varbi kiel eble plej multajn apogantojn. Por tio prezentiĝas multaj eblecoj. Oni povas varbi inter familianoj, parencoj, geamikoj kaj gekolegoj. Oni povas utiligi festetojn kaj festenojn. Bedaŭrinde ĝis nun ne multaj membroj klopodis havigi apogantojn al la Asocio. Sed la spertoj de tiuj malmultaj, kiuj provis varbi, montris, ke tiu tasko ne estas malfacila. La subskribinto sen multe da peno havigis 10 apogantojn. F-ino Marjorie Boulton, nia konata poefino, varbis ĝis nun pli ol 20. Ĝis nun ŝi tenas la rekordon. F-ino Marjorie Boulton estas profesoro kaj vicdirektoro en Kolegio, multe verkas en la angla kaj en Esperanto, gvidas kurson de Esperanto en la Kolegio, sed tamen trovis tempon por varbi multajn apogantojn. Ŝi estas ne nur gratulinda; ŝi devas servi kiel ekzemplo por ĉiu esperantisto kaj esperantistino organizita en UEA.

Proksimume 25 mil membroj troviĝas hodiaŭ en UEA. Se ĉiu membro varbos nur 5 apogantojn, la Asocio havos 125.000 registritajn subtenantojn kaj la financa efiko estos 625.000 ned. guldenoj, aŭ 62.500 pundoj! Intence estas uzita la futuro kaj ne la kondicionalo: mi estas profunde konvinkita, ke per bona volo tio estas atingebla.

La signifo de tiu ĉi granda kampanjo estas plurobla. Antaŭ ĉio ĝi ebligas al ĉiu unuopa esperantisto aktiviĝi per la bono de la Movado. Oni ne povas varbi sen prezentado de la celoj de la Esperantismo. Tio signifas, ke la varbado estas samtempe efika propagando por la Internacia Lingvo. Ampleksa varbado havigos al la Movado konsiderindajn financajn rimedojn, kiuj estos je dispono por la tutmonda informado pri Esperanto per plej modernaj metodoj kaj per aliaj celoj laŭ la Baza Laborprogramo. Granda nombro de apogantoj tre altiĝos la prestiĝon de UEA kaj tio siavice signifos fortan apogon al ĝiaj aktivecoj. Fine, ĉiu apoganto fariĝos aktiva defendanto de Esperanto: tiu, kiu iam pagis eĉ malgrandan sumeton por io, neniam permesos, ke en lia ĉeesto oni ataku tion, por kio li pagis! Se la varbanto lerte prezentos la aferon, eble la apoganto eklernos kun la tempo la lingvon. Tiucele, estas utile doni al ĉiu varbito unu ekzempleron de la *Ŝlosilo*. Ankaŭ la 6-lingva flugfolio de UEA estas taŭge utiligebla por la varbado.

Kiel oni vidas, la signifo de la kampanjo estas tre granda. De ĝia sukceso multrilate dependas la grado kaj amplekso de la estontaj aktivecoj de UEA. Tial la estonteco troviĝas en viaj manoj: en la manoj de ĉiu individua kaj asocia membro de UEA. Ĉiu — de la Prezidanto ĝis la simpla asocia membro — faru sian devon! Diskonigu la kampanjon en viaj societoj kaj grupoj! Ne estu

trankvila antaŭ ol vi varbos almenaŭ 5 apogantojn!

En 1959 en la tuta mondo estos festata la 100-jara datreveno de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof, la genia aŭtoro de la Internacia Lingvo. Ni promesu al ni mem, ke ĝis tiu jaro ni atingos 30.000 membrojn de UEA kaj almenaŭ 100.000 apogantojn! Por atingi tion ni ekaŭ senprokraste.

D-ro Ivo Lapenna

HELPU AL LA HUNGARAJ RIFUĜINTOJ

La Estraro de UEA varme rekomendas al la tutmonda esperantistaro la sekvantan alvokon de s-ro Franz Höfert, ĉefdelegito de UEA por Aŭstrujo:

Ankoraŭ estas trans nia potenco malhelpi tiajn katastrofojn, kia ĵus okazis en Hungarujo, sed ni mildigu la mizerojn de la malfeliĉuloj, ni sekigu la larmojn de la infanoj, gemaljunuloj, de la virinoj kaj viroj, ni satigu la malsatulojn kaj vestigu la preskaŭ senvestitojn, la frostantojn pro manko de vintrovestaĵoj.

Helpu el ĉiuj landoj de la mondo, el kiuj oni povas sendi monon al Aŭstrujo! Helpu tiuj! Aŭstrujo jam multe subtenis, subtenas kaj subtenos, kiom estas al ni eble, sed estas tre multe da mizerego por nia malgranda lando! Ĉiuj helpu al la rifuĝintoj! Mi antaŭdankas pro ĉiu — ankaŭ malgranda — donaco, sed mi ne kapablos dankskribi al ĉiu helpinto. Do, mi sendos detalan liston nur al tiuj, kiuj estos pagintaj almenaŭ la sumon en valoro de 100 aŭstraj ŝilingoj; krome, mi sendos kompletan liston de la donacintoj al la redakcio de „Esperanto” kaj informos pri la uzo de la sumoj. Konsiderante la fakton, ke en multaj landoj oni kolektis kaj ankoraŭ kolektas financajn rimedojn por ĝenerala helpo al ĉiuj rifuĝintoj, kiel ankaŭ la fakton, ke diversaj institucioj establis specialajn fondaĵojn por helpi al difinitaj kategorioj de rifuĝintoj, mi intencas uzi la kolektotan sumon ĉefe por helpo al la rifuĝintoj-esperantistoj el Hungarujo kaj

por la esperantistaj rifuĝintoj ĝenerale.

Kiu scias rifuĝintojn en Aŭstrujo, bonvolu atentigi ilin pri mi, sed mi petas, se vi skribos al mi, skribu tre koncize kaj precize, tiel ke mi ne perdu tro multe da tempo. Ne postulu respondojn pri malgravaj demandoj! Mi jam nun estas tro ŝarĝita; nur la teruraj malfeliĉoj instigis min al ĉi tiu alvoko.

Ĉiujn pagojn bonvolu fari al S-ro Franz Höfert, Wien 89, Penzingerstrasse 121, Aŭstrujo.

ANKAŬ LA A.O. EN ROTTERDAM AKCEPTAS KONTRIBUOJN

Por faciligi la kolektadon de kontribuoj por la hungaraj rifuĝintoj kaj la aliaj viktimoj-esperantistoj, la Administra Oficejo de UEA en Rotterdam akceptas mondonacojn. La membraro estos informita pri la utiligo de la kontribuoj pere de la organo de la Asocio.

Nia kovrilo

En nia numero 608-9 ni vokis niajn artistojn proponi kovril-desegnaĵojn. Responde venis 17 projektoj de 10 artistoj. La laŭlanda statistiko de artistoj estis: Britujo (2), Ĉeĥoslovakio (3), Francujo (2), Germanujo (1), Islando (1) kaj Nederlando (1).

La juĝa komisiono ne havis facilan taskon. Ilian finan elekton oni povas vidi sur la hodiaŭa numero de nia revuo.

La elektitan projekton sendis s-ro Milton (Britujo), kaj ĝin iomete modifis s-ro Calado (Nederlando). Sekve la premion de 5 anglaj pundoj (200 steloj), aĝable donacitan de ges-roj Holmes, estos dividita inter la du samideanoj.

La redaktoro kaj la juĝkomisiono deziras esprimi tre varman dankon al ĉiuj, kiuj sendis projektojn kaj tiel pruvis la ardan intereson, kiun ili havas pri la bono de nia revuo.



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V.” sendu al:

Nicola Minnaja,
Viale Giulio Cesare 223, ROMA, Italujo

Esperanto bezonas la junularon La junularo bezonas Esperanton

Rigardante dum kelkaj jaroj la Esperantistajn kongresojn kaj kunvenojn, oni konscias pri la fakto, ke la junularo estas reprezentata relative malmulte, eĉ se laŭ nombre eble estas pli da junuloj ol da maljunuloj. Sed tamen, ĉar la junularo ja ĝenerale pli vojaĝas kaj havas ankaŭ pli da facilaj, ĝi devus esti en multe pli granda nombro en la Esperantomovado.

Ne nur temas pri tio, ke, ĝenerale dirite, ni devus havi pli da junaj amikoj en nia rondo.

Ĝuste Esperanto bezonas la junularon, ĉar la junularo devus foje transpreni la tutan laboron. Ĝi devas formi la kadron aktivan de niaj strebadoj. Ĝi devus disvastigi niajn ideojn en la tuta mondo, enpenetriĝi nian lingvon en ĉiujn rondojn. Estas tute nature, ke la problemo estus tuj solvita post ĝenerala enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Sed, kvankam tiu solvo estas plej dezirinda, ni tute ne scias, kiel longe ni ankoraŭ devas atendi, ĝis kiam oni almenaŭ en kelkaj landoj efektigos tiun nian ardan deziron.

Ni do devas agi laŭeble plej aktive por gajni la junularon, por aliri junajn amikojn al niaj rondoj.

La fondo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo por tiu celo jam estas granda paŝo antaŭen. Ĝi donas al la junularo pli da eblecoj ol ĝis nun, memstare labori kun pli granda efiko.

Dua punkto, kaj certe tre grava, devas esti la enkonduko de Esperanto en la familiojn de la Esperantistoj.

Kiu konscias pri la vere grandegaj edukaj valoroj de Esperanto sur ĉiuj kampoj de la edukado, certe jam komencis eduki siajn filojn aŭ pli junajn gefratojn en Esperanto, prefere ek de naskiĝo.

La rezolucioj de la Tria Sekcio en la Kopenhaga kongreso povas esti tre valoraj en tiu rilato. Ni esperas do, ke en estonteco ĉiuj unuopaj Esperantistoj streĉos siajn fortojn enkondukante Esperanton en la propran familion. Se ni atingas tion ĉe ni, ni havas pli grandan moralan rajton, postuli la ĝeneralan enkondukon.

Jam hodiaŭ ni komencu!

Dirante, ke Esperanto bezonas la junularon, ni devas scii, ke tie estas nur unu flanko de la problemo, ke vere hodiaŭ pli ol iam la junularo bezonas Esperanton. Studante kiel edukisto la situacion, en kiu troviĝas la junularo de la mondo, oni kun granda bedaŭro konstata, ke ĝi grandamase perdis la senco por altaj idealoj, ke ĝi estas sur vojo kiu nur povas konduki al nebona fino. La kaŭzoj estas konataj: du teruraj militoj, ĝenerala malbona familia edukado kaj nesufiĉa ŝtata atento al la elstaraj edukaj problemoj.

Nur prenante kiel ekzemplon la problemon pli kaj pli graviĝantan de la tiel

nomataj „duonfortuloj” en la Germana Federacia Respubliko, oni povas evidente sperti la gravajn sekvojn. Kiel multaj plenkreskuloj, iliaj gepatroj, la gejunuloj, se ili ne havas per aliaj kaŭzoj bonan kontraŭpezadon rilate eksterajn influojn, nur alstrebas materiajn posedaĵojn kaj ĉiujn ĝuojn kiujn la hodiaŭa vivo povas oferti al ili, tute forgesante pli esencajn ecojn de vera homa vivo. Estas ankaŭ tiuj kiuj demandas, ĉu oni povas fariĝi sufiĉe riĉa per Esperanto aŭ simile. Per tio mi jam volas diri, ke feliĉe ĝenerale tiuj tipoj ne troviĝas inter la Esperantistaro. La Esperantistoj havas kontraŭe tre altajn idealojn kaj oferas ankaŭ multe da mono por tiuj idealoj.

Estas ĝojige konstati, ke en multaj tiaj rilatoj ankaŭ nia Esperantista junularo distingas sin esence de la ĉetera. Se oni post tre detala trastudo de la problemaro povas nur veni al tiu konkludo, certe estiĝas la grava demando, kia estus la tuta junularo, se oni edukus en kaj per Esperanto. Profesoro D-ro Ivo Lapenna en sia festparolado en Kopenhago ĝuste konstatis, ke la Internacia Lingvo estas esence, laŭ la naturo mem de la afero, ligita al ideoj. Nur aludante al la minimumaj ideologiaj elementoj de Esperantismo, kiujn li difinis per: egaleco de ĉiuj rasoj kaj nacioj, tuthoma solidareco kaj respekto al la homaj rajtoj, kaj libereco, ĉar nur en plena libereco floras la egaleco kaj fortikiĝas la solidareco, ni ne povas eĉ imagi, kian spiritan resaniĝon travivus la tuta homaro post ĝenerala disvastigo de tiu ideologio ligita rekte al Esperanto, ne parolante pri la aliaj valoroj de Esperanto por la kompleta solvo de la lingva problemo kaj por la eduko en pli malvasta senco.

Ni ne scias tamen, ĉu la junularo fariĝus pli bona, se ĝi fariĝas tia alia; sed kion ni scias estas tio, ke ĝi devas fariĝi alia, por fariĝi pli bona.

Ni do ne preterlasu unu okazon por varbi novajn amikojn junajn por niaj ideoj; ĉar LA JUNULARO BEZONAS ESPERANTON.

Günther Becker.

Internacia junularkunveno en Groet (10-17 aŭg. 1938)

(el letero de la organizintino, s-ino E. van Veenendaal-Bouwes).

Pro instigo de du instruistinoj, f-ino Lepachlet el Francujo kaj f-ino Rees el Kimrujo, ni komencis en 1938 aranĝi Internacia Junular-Kunvenon por geknaboj 12-18-jaraj (legantoj de „La Juna Vivo”) en bela loko en la dunregiono en Nederlando. La intereso por ĉi tiu kunveno estis multe pli granda ol mi atendis. Entute partoprenis 203 junaj Esperantistoj el 9 landoj. La enhavo de la programo estis altnivela kaj varia. Interalie estis ludataj teatraĵoj „Paŝtisto de porkoj” el Andersen (francaj infanoj el Somain), „Kion la patro faras, tio ĉiam estas bona” kaj „La novaj vestoj de la reĝo” el Andersen (nederlandaj infanoj el West Grafdijk). „La ĉemizo de la feliĉulo” (infanoj el Birmingham) ktp.; okazis ko-

muna kantado el la kantaro „La Juna Vivo”, popoldancoj kaj kantoj el diversaj landoj; projekcio de lumbildoj pri Volendam kaj la sekigo de la Suda Maro; ekskursoj al Volendam, al la fama sudmara digo, al la fromaĝfoiro en Alkmaro, kie de la turo subite sonis dufoje „La Espero”; promenoj tra la dunoj ĉe la maro. Proks. 35 knabinoj el Bishop Auckland hore deklamis „La vojo”; pola knabino bele pianludis. La konata franca Esperantisto Pierre Delaire, tiam 18-jara, parolis pri „Esperanto kaj paco”, kaj nia ĉefa pioniro, s-ro Glück, parolis pri d-ro Zamenhof. La kunvenintoj ricevis ilustritajn prospektojn en Esperanto pri Alkmaro, pri Groet, pri Volendam, pri Enkhuizen, pri la sekigo de la Suda Maro, pri Nederlando. La muroj de la salono estis ornamitaj per desegnaĵoj de Floor Meydam (nun konata desegnisto en Nederlando), Jekke van Dijk kaj Dagmar Lind (knabino Svedujo). S-ro Glück diris en la fino de la kunveno: „La inter-

nacia junularkunveno estas la tria granda okazintaĵo en la Esperantomovado.” En Groet (16 aŭg. 1938) naskiĝis Tutmonda Junular-Organizo (T.J.O.). La ĉefa celo de ĉi tiu organizo estas, interfratigi la homojn per Esperanto.

ĈIAM GAJA

Teksto kaj muziko de Berthold Fischer
Kantita en Büsum dum la TEJO-kongreso

*Je l' fino de l' monato finiĝas la moner',
Ni tamen restas gajaj, liberaj sur la ter'!*

*Feliĉe aĉetadas des pli en estontec',
Do se ni povus agi, regadus la bonec'!*

*Kiam atingos nin vespero,
La mono jam estos for;*

*Des pli ni kantos sen ĉagreno,
Sen aflikto kaj sen dolor'!*

*Je l' fino de l' monato finiĝas la moner',
Ni tamen restas gajaj, liberaj sur la ter'!*

Niaj Konkursoj

Literatura Vetludo 1.

La japana utao, fiksfirma poemo el 31 silaboj (5, 7, 5, 7, 7) bone hejmiĝis en nia kulturo. Ekzemplojn oni trovas en *Eterna Bukedo* kaj *Izolo* de Kalocsay, en *Verda Parnaso* de I.U., en *Eseoj I.* de G. Waringhien kaj aliloke. Mi invitas la legantojn resumi per utao iun konatan Esperantan poemon originalan. Eventuale oni povus utaiĝi originalan novelon aŭ romanon. Jen ekzemplo el la plumo de nia redaktoro:

Hohlov: Chante-claire

*Tro frue krias
ĉi koko en obskuro.
Kaj mi, poeto,
al surda mond' aklamas
aŭronon de l' futuro.*

Nepra estas la silabnombro, rimo estas indifera. Provoj atingi la redakcion ĝis 15-a de marto, 1957. La plej bonaj ricevos libropremion.

Konkursantoj povas alpreni pseŭdonimon, se ili preferas (sed aldonu ĝustan nomon kaj adreson).

John Varty

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Baraona. La 23an de julio 1956, al Ges-oj Alfonso kaj Carmen **Baraona** en Santiago Ĉilio naskiĝis dua fileto **Rodrigo**, frato al **Claudio** Alfonso.

Mathieu. La 16an de oktobro naskiĝis al Ges-oj Albert kaj Simone **Mathieu**, 52 rue Théodore Bac, Limoges, Francujo, dua infano **Alain-Henriko**, frato por 3-jara **Johano**.

Rosbach. Le 13an de oktobro naskiĝis filo, la tria infano, al Ges-oj H. kaj H. A. **Rosbach**.

NEKROLOGO

De Bruin. La 27an de oktobro mortis en la aĝo de 61 jaroj **Gerrit Paulus de Bruin**, Preangerstraat 35, Enschede, Nederlando.

Couche. La 24an de julio mortis **Jack Couche**, 78 Cascades Road, Hobart, Tasmanio.

Faux. Conrad Stanley, 19 monata fileto de ges-anoj **Margaret** kaj **Derrick Faux**, Wheathill Bruderhof, Bromdon, Bridgnorth, Shropshire, Anglujo, dronis je 30.IX.56 dum li ludis en ĝardeno.

Hölzenspies. Mortis sindona delegito kaj M.S. de UEA en Baarn, Nederlando, d-ro **W. Hölzenspies**, tiea lerneja kuracisto.

Heidemann. D-ro **Eduard Heidemann**, delegito de UEA en Hannover, Germanujo, esperantisto ekde 1912, mortis subite kelkajn tagojn antaŭ la Unesco-vespero de la tiea grupo, kiun li volis gvidi.

Le Seac'h. Bretona samideano, delegito en Quimper, Francujo, esperantisto ekde 1906, mortis. En januaro 1956 li festis la 50-jaran jubileon de sia esperantisteco.

La Esperantista Junularo

Antaŭ nur kelkaj jaroj la konsisto de la Movado el vidpunkto de la aĝo estis tre nekontenta. Preskaŭ ĉie sentiĝis — kaj en pluraj landoj ankoraŭ sentiĝas — granda manko de junaj fortoj.

Tiun ĉi danĝeran staton kaŭzis ĉefe la Dua Mondmilito. Unuflanke ĝi malhelpis, en la pliparto de landoj eĉ tute haltigis, la disvastigon de la lingvo ĝenerale, sed tute speciale inter la junularo. Aliflanke la antaŭmilita juna generacio de esperantistoj, sekvante la sorton de milionaj amasoj, grandparte pereis sur la batalfrontoj aŭ estis alimaniere detruita.

En la unuaj jaroj post la milito la klopodoj estis direktitaj ĉefe al rekolekto de la fortoj kaj al restarigo aŭ reorganizo de la Movado, sed malmulte da atento estis dediĉita al la laboro inter la gejunuloj. Ilia esperantistiĝo estis pli-malpli hazarda. La malmultaj, kiuj ellernis la lingvon kaj aliĝis al la Esperanto-organizaĵoj, kutime — ne ĉiam, ĉar feliĉe ekzistis ankaŭ esceptoj — ne ricevis iajn ajn funkciojn aŭ apartajn taskojn. Ili sentis sin superfluaĵ, ne malofte eĉ tute fremdaj. Kaj ili baldaŭ malaperis.

TEJO, kiel speciala junulara organizaĵo, pro diversaj kaŭzoj ne povis en la ĝisnunaj organizaj formoj efike solvi la problemon. La ĉefa el la kaŭzoj troviĝas en la fakto, ke juneco ne estas profesio aŭ fako, sed mallonga, transira periodo en la vivo. Tial la membraro de ĉiu ajn gejunulara organizaĵo devas, laŭ la naturo mem de sia konsisto, senĉese ŝanĝiĝi (tio, parenteze estu dirite, ne okazadis konsekvence en TEJO). Sekve, tia organizaĵo, se ĝi volas efike plenumi sian rolon, devas ne esti organizita laŭ la principoj de fakaj societoj, nek ĝi povas esti celo al si mem. Male, ĝia duobla fundamenta funkcio devas esti: 1. larĝa disvastigo de la lingvo kaj de ĝia praktika uzo en la junularaj medioj kun samtempa konstanta havigo de novaj membroj; 2. paralela „perdado“ de la membroj, sed perdado utila kaj fruktodona per konstanta liverado de novaj lingvouzantoj, batalantoj, organizantoj kaj gvidantoj kun modernaj ideoj al la ĝenerala Movado en lokaj, landaj kaj internaciaj kadroj, sur ĉiuj kampoj de praktikaj aplikoj.

En la lastaj jaroj kaj UEA kaj pluraj landaj asocioj komencis komprenadi la gravecon de la esperantista junularo por la estonteco de la Movado. Ankaŭ la junularo mem ekmoviĝis kaj komencis serĉi sian propran vojon. Formiĝis junularaj grupoj. La itala kaj germana landaj asocioj kreis specialajn junularajn sekciojn. En multaj lokaj grupoj okazis la samo. Dum la universalaj kongresoj estis organizitaj oratoraj konkursoj kaj diskutaj aranĝoj por gejunuloj kun la celo ebligi al ili aŭdigi sian voĉon.

La kulmina punkto de tiu evolulinio estis la Tria Sekcio „Esperanto kaj Junularo“ de la kongreso en Kopenhago kaj la preparlaboroj efektivigitaj de la Internacia Junulara Kunveno en Büsum. Rezulte de ampleksaj diskutoj kaj traktadoj, dum kiuj la esperantista junularo montris sian maturecon kaj bonan komprenon de la problemo, estas fiksitaj la novaj organizaj principoj. La Rezolucio de la Tria Sekcio antaŭvidas la organizigon de la gejunuloj en la lokaj grupoj, landaj asocioj kaj UEA en formo de apartaj sekcioj, gvidataj de gejunuloj mem, sed en firma ligiteco kun la koncernaj organizaĵoj. La internacia junulara organizaĵo havos, kiel ĝis nun, la nomon Tutmonda Esperanto-Junulara Organizo (TEJO), sed ĝi estos sekcio de UEA kun propra Estraro.

Plenumante la sugestojn kaj proponojn de la Rezolucio de la Tria Sekcio, la Komitato de UEA jam konsentis, ke la gejunuloj malpli ol 21-jaraj pagos nur duonan kotizon de MJ kaj MA; ke en la revuo „Esperanto“ regule aperu speciala rubriko dediĉita al la junularo; ke gejunuloj kun la aĝo ek de 18 jaroj havu la eblecon fariĝi delegitoj por junularaj aferoj.

Nun estas la tasko de ĉiu landa asocio formi kiel eble plej baldaŭ sian junularan sekcion en la senco de la Rezolucio. En Germanujo kaj Italujo tiuj sekcioj jam funkcias kaj la landaj organoj de tiuj asocioj jam publikigas specialajn rubrikojn, redaktatajn de gejunuloj por gejunuloj. Laŭ la sama modelo ankaŭ la aliaj landaj asocioj povas organizi siajn junularajn sekciojn. Komprenoble, nenio malhelpas, ke oni adaptu la detalojn de la organizaj formoj al la cirkonstancoj en la koncerna lando. La ĉefa afero estas, ke junularaj sekcioj estu organizitaj en ĉiuj landaj asocioj kaj laŭ ebleco ankaŭ en ĉiuj lokaj grupoj. La fundamenta organizprincipo, akceptita en la Rezolucio, devus esti, ke ĉiu junulo aŭ junulino sub certa aĝo (ekzemple 25 jaroj aŭ malpli, depende de la landoj), per aliĝo al la loka grupo, landa asocio aŭ UEA aŭtomate fariĝas membro de la junulara sekcio en la koncerna organizaĵo.

La Tria Sekcio elektis 7-membran Komitaton, kies tasko estas elabori la statuton de la nova internacia junulara asocio kaj energie antaŭenpuŝi ĝian efektivigon kaj plenan funkciadon en la tuta mondo. La nomoj de la elektitaj komitatanoj — Becker, Ciliga, Fighiera, Minnaja, Moorst, Reiter, Reuchlin — ĉiuj perfektaj esperantistoj, inteligentaj kaj kleraj junaj homoj, kelkaj el ili kun gravaj funkcioj en la Movado, estas garantio, ke la Kopenhaga Rezolucio ne nur realiĝos, sed ankaŭ donos tre utilajn fruktojn por la esperantista junularo kaj por la Movado ĝenerale.

La esperantista junularo deziras labori por Esperanto kaj utiligi la lingvon por siaj celoj laŭ novaj principoj, kiuj plene respondas al la bezonoj, taskoj kaj rolo de tia organizaĵo. Ĝi etendis sian manon, prezentis taŭgajn formojn de kunlaborado kaj nun atendas komprenon kaj helpon de la landaj asocioj kaj lokaj grupoj. Tiu helpo devas esti donita. Ju pli baldaŭ des pli bone. En la intereso de la esperantista junularo kaj en la intereso de la tuta Movado, kiu multrilate bezonas freŝajn fortojn kun firmaj konvinkoj kaj fidoj.

MANDE (Lot et Garonne), Francujo. Aldoninte tri respondkuponon, vi nepre ricevos la tri unuajn informilojn.

- El protokolo de L.K.K.: „La Loka Kongresa Komitato de la 42a Universala Kongreso de Esperanto, kunvokite en Marseille la 9an de novembro 1956, post atento al la situacio maturiĝinta en la mondo en la lastaj tri semajnoj, direktas sian zorgoplenan penson al la Esperantistoj mortintaj aŭ en danĝero en ĉiuj militfrapitaj terpartoj, kaj fermas la laborojn en signo de doloro kaj funebro”.

- La Meti-Lernejo Gewerbliche Berufsschule Radebeul I, Strasse des Friedens, RADEBEUL, Germanujo, serĉas pliajn kontaktojn kun metiolernejoj en eksterlando pere de Esperanto. La korespondado okazu en nacia lingvo plus Esperanto.

- La „Mittelschule” Radebeul II (Harmoniestrasse, RADEBEUL, Germanujo) estas preta korespondi kun lernejoj en altaj landoj. 33 infanoj el du klasoj deziras korespondi. Por informo, vin turmu al s-ro W. Ranft, RADEBEUL, Freiligrathstr. 4, Germanujo.

- La gazeto „Trees and Life” (Arboj kaj Vivo) aperigis en sia numero de oktobro 1956 artikolon „Fluganta Semo” de D-ro Paul Neergaard, aperinta en „Norda Prismo”, en traduko de s-ro J. W. Leslie, F.B.E.A.

- „Kolarovgradska borba” (Bulgarujo) en sia numero de 31a de oktobro 1956, presigis artikolon de redaktoro A. Bojadjev pri la kreskado de la Esperanto-movado.

- La Amerika Humanisma Asocio, ĉe sia jarkunveno, konfirmis por si la konatan Rezolucion de UNESKO, kaj en ĝia organo „The American Rationalist”, septembro 1956, aperis 2-paĝa artikolo de s-ano George Falgier pri Esperanto, plus unupaĝa kompara teksto en Esperanto.

- Belegan ilustritan katalogon pri siaj Esperanto-eldonaĵoj eldonis Limburger Vereinsdruckerei, LIMBURG/LAHN, Germanujo. Tiu modela katalogo certe instigos la samideanojn al aĉetado de la bele produktitaj libroj de la konata firmao.

- Bela turima prospekto, kun Esperanto-aldono „La valo de Tegernsee, vera trezorujo”, estas senpage havebla ĉe F-ino Anna M. Orterer, Delegitino de UEA, (13b) Kreuth bei Tegernsee, Rathaus, Germanujo.

- „La vrai bilinguisme” (La vera dulingvismo) estas trafa aŭto eldonita de la Esperantista Asocio de Quebec, Kanado. (513 Bd. St. Laurent, Montreal, Kanado.)

- La ĉiujara foiro de la Londona Esperanto-Klubo ĉijare profitis £ 60.

I. L.

Tra la Mondo

- La Urugvaja Esperanto-Societo nun havas propran ejon, kie ĝi disponas pri oportuna loko por kunsidoj, biblioteko kun ĉ. 1000 eroj, kaj kursoj.

- Dimanĉon la 25an de novembro okazis la 50-jara jubileo de la fondiĝo de la unua Esperanto-klubo en Oslo, kiu estis samtempe la unua Esperanto-organizaĵo en Norvegujo. Okaze de la jubileo la urba biblioteko de Oslo prezentis dum 2 semajnoj belan ekspozicion de Esperanto-literaturo.

- La Urugvaja Esperanto-societo festis la Oran Jubileon de la organizita Esperanto-movado en Urugvajo la 15an de oktobro 1956. Tio fakte okazis kun malfruiĝo de unu jaro, ĉar la fondiĝo de la unua Esperantista Grupo Montevideo okazis la 24an de septembro 1905.

- La unuan fojon en la historio de la bulgara movado, ŝtata eldonejo komencos ekde januaro 1957 aperigi monatan gazeton „Nuntempa Bulgario”, redaktotan nur en Esperanto. La revuo estos riĉe ilustrita; ĝi aperos ĉiumonate sur 32 paĝoj plus kovrilo. Ĝi havos eksterordinare malaltan abonotizon: por la ĉ. 400 paĝoj de la jarkolekto (formato 21 x 26) alilandaj abonantoj pagos 4 rublojn, 1 usonan dolaron, 7 anglajn ŝilingojn, 350 fr. fr. ktp.

- La 21an de majo 1956 okazis kongreso de esperantistoj en Ĉilio. La kunveno estis en Santiago. Tie oni aranĝis ankaŭ ekspozicion de esperantaj libroj, gazetoj, poŝtkartoj, k.s.

- Muziko, artoj kaj sciencoj estas vere internaciaj. Tial ne surprizas, ke en lasta tempo pli kaj pli ofte aŭdiĝas postuloj unuigi sciencistojn kaj fakulojn, unuigi fakan kaj sciencon literaturon en Esperanto. En Ĉeĥoslovakio oni intencas prepari fakan vortaron pri arkitekturo kaj konstrua industrio, enhavonta 4.000 terminojn. Ni aprobas ĉiun penadon kiu celas unuigi la fortojn por venko de Esperanto, kaj rekomendas la alvokon de arkitektoj-esperantistoj. Ni ankaŭ stimulas ĉiujn klubojn kaj unuopulojn atentigi je tiu alvoko. (Vd. koncernan Anoncon.)

- Krei Tutmondan Union de Kolektantoj (pri filatelajoj, esperantaĵoj, diversajoj, ktp), kaj eldoni bultenon indan je nia Movado, tio estas celo de la klopodoj de pluraj samideanoj, kiuj, ricevinte multajn kuragiĝojn, jam eldonis la unuan informilon pri tia kreado. Ĉiuj kolektantoj povos sin turni al unu sidejo por ĉia bezonata servo kaj informo. Por partopreni en la kreado de tiu Unio kaj ricevi informojn, bv. skribi al s-ro Jean Dalet, 79 bis Rue du Château, ASNIERES (Seine), Francujo, aŭ al s-ro André Ribot, 11 Rue Paul Vergnes, MAR-

Fajraĵoj en la nokto

Tio estas rememoro de l' tempo kiam mi ankoraŭ estis juna hezitemulo. — Kiom da jaroj malantaŭen? Komprenu: tio okazis al mi en aĝo kiam la animsentoj, ankoraŭ decaj, hontas sin manifesti. Poste — strangaĵo — maltimo kreskas egalpaŝe kun maldececo, kaj oni des pli kuraĝas peti amon, ju pli oni fariĝas je tio malinda.

Emma min timigis, ĉar ŝi ĉiam ridadis. Ŝia rido estis hela kiel ŝia vizaĝo, batalema kiel ŝia rigardo. Mi sopiris ĝin sorbi, tiel freŝan kaj gajan, el ŝiaj lipoj, ne malkovrante tamen mian sekreton. Kaj ju pli feliĉa ŝi aspektis, des pli mi paliĝis je kolerero, je turmentiĝo pro mia timema embaraso, furioza kontraŭ mi mem, kontraŭ ŝi, kontraŭ la Naturo, kiu absurde faras la homojn tiom pli amoriĉaj kiom pli nekapablaj je amdeklaro.

Emma multe al mi estadis afabla; eĉ, pripensante nun post tiom da tempo, mi estas preskaŭ certa, ke ŝi estus akceptinta mian amsenton, se mi estus kuraĝinta ĝin malkaŝi. Supozeble mi ŝajnis iomete eklipsita, preskaŭ nuligita, pro tiu malheleco en kiun mi volvadis min mem per mia hezitemo. La junulino, jus lasinta la lernejon, avida je vivo, ŝatis lumojn, kolorojn, ĉion sonorantan aŭ eĉ nur bruantan ĉe ŝiaj scivolemaj oreletoj: ĉarmaj konketoj, apud kiuj mi supozis, ke oni povas aŭskulti la maron! Tiele, dum mi ŝin adoris en ombro, la tagoj de l'etolino fluadis en senlaca kurado, en seninterrompa foriro al la maro, al la montaro, al la teniso, al la rulglitejo, al la dancoj, al la vetkuroj, al la societaj aŭ ĝardenaj ludoj. Teatron ŝi ne iris, ĉar ŝi ne kapablus tri horojn resti senmova. Ŝi preferis veturadon per motorciklo ol la plej amuzan komedion, ruinigan disfalon per glitveturilo ol la plej emociantan tragedion, kaj — kvankam frekventinta dum kvin jaroj muzik-konservatorion — ŝi volonte estus doninta la tutan Tetralogion kontraŭ tri karuselaj rondiroj sur la dorso de paperkaĉa porketo, kun siaj diablece nekombitaj haroj odorantaj je koriandroj.

Aminda paĝia harareto, kiun ŝi tiutempe portis mallongigitan, kies maldikaj blondaj fadenoj ĉiam retenis iun folieton aŭ dornon dum la anhelaj persekutoj en la ĝardeno de ŝia hejmo! Efektive, la reciproka kursekvo estis nia kutima ludado. Kiam okaze ia dorno ŝian genuon estis gratinta, Emma malkovris naive la ofenditan kruron antaŭ mi tremetanta, fingromontrante sangoguton sur la alabastra haŭto. Tuj poste, la kruron kovrinte, ŝi kun larĝa ridado ekkuris denove, ŝtonetojn disfrapante, kaj krietante al la merloj sur la branĉaro.

Al Emma plaĉis la merloj pro ilia fajfeto, la paseroj akre krietantaj, la paruoj pro ilia gaja senĝena bruado. Najtingalo ŝajnis al ŝi jam tro me-



lankolia. Rilate sonorilojn, kiujn mi amis pli ol ĉiujn aliajn muzikilojn de l' Tero, ŝi absolute ne povis ilin toleri. Mi eĉ opinias, ke ĝuste tiu antipatio de la junulino estis la ĉefa kaŭzo, dum la du jaroj de nia konateco, de mia nevenkebla timemo apud ŝi. Min tro teruris, antaŭ ol mi ekparolis, la supozo ke mia deklaro — voĉo el animo apartigita kaj senkonsola — ŝajnos al ŝi simila al funebra sonorado. Ŝi amis lumon kaj bruegon; mi solecon kaj silenton. Iun tagon — mi tion klare rememoras — al Emma mi oferdonis rozon. Ŝi min dankis, ĉirkaŭturnis la floron inter la fingroj nervaj, ĝin longe flaris; sed, kiam ŝi jam estis fiksona ĝin sur sian bluzon, subite ŝi ekmemoris pri lerneja ŝerco; ŝi disrompis petalon, interproksimigis ties randojn laŭ maniero de iu bombeto, kiun poste ŝi eksplodigis sur sian frunton. Kaj jen ŝi ridadis, ridadis, kiel frenezulino. Mallonge: petalon post petalo, la tuta rozo detruigis en longa laŭta pafado. Kaj mi eĉ unu vorton ne kuraĝis diri! La postan vesperon ni iris kune por vidi filmon de Max Linder; iu-momente, pro la ridego, ŝia blonda kapeto falis sur mian ŝultron; ankaŭ tiam mi nenion diris. La morgaŭan vesperon — estis dimanĉo — kun ŝia frateto kaj mia kuzineto ni aliris spektaklon art-fajraĵan. Tiajn vidaĵojn ankaŭ mi ŝatis, kvankam alimaniere ol Emma, kiu — eble — ilin amis nur pro iliaj bruego kaj brilado; mi, kontraŭe, en ili taksis ian misteran kadukecon, nome: morti dum ĝojego, subita malapero en neesplorableblan Nokton tuj post brilega triumfo sur la ĉielo.

Tiu fajra vespero en la Areno flamiĝas ankoraŭ kruela en mia memoro. Ni rifuĝis, Emma kaj mi, al bedo de l' Parko, kaj ni staris apud la sama arbotrunko, dum la geknaboj nin akompanintaj

estis sin aranĝintaj rande de la herbejo, en kelkmetra malproksimo. Kvankam aliuloj tie estis, la loko sufiĉe vasta kaj la mallumo sufiĉe densa donis al ni iluzion de izoleco. Ŝi portis muslinan bluzon tiel malpezan, ke mi retenadis mian spiron pro ĉasta timo, ke ŝi disblovos ties randojn. Sed mi preskaŭ perceptadis la batetojn de ŝia junulina brusto dum la atendo avida; la parfumo de l' knabino min atingis, varmeta kaj milda: tiu bonodoro — vi scias — kvazaŭ de freŝa herbo, kiu devenas de senmalica knabino.

— Emma! — subite mi parolbruetis, timante eĉ mian voĉon kaj retirante la manon, kiun mi jam estis etendanta.

— Jen! jen! — ŝi ekkriis, levinte nudan brakon al la horizonto por fingromontri la unuan raketon: forpeladon de ruĝaj fajroj, eksplodiĝon de sangaj gemoj. Ŝajnis al mi ke tie supre, alten, alten, ankaŭ mia koro estis krevanta.

— Emma! — mi balbutante resilabis. Sed Emma ne plu min aŭskultis: tremetanta, gajega ŝi montris al mi unu post alia la raketojn, la paperbombojn, la defalantajn stelojn, la radfajraĵojn, kiujn piroteknikisto seninterrompe suprenjetadis en la mallumon. Ruĝaj, oraj, lazuraj flamoj interkonkure supreniris kontraŭ la stelaron, kaj verdaj, kaj flavaj, kaj bluaj. Unu flagro mergiĝis en alian; el unu eliris cent flamoj; el planedo aro da konstelacioj. La spirito de astraj Elfoj ĝojegis en eksplodo. Ĉu korimbe, ĉu bukede, ĉu girlande, jen subite burĝonantaj el nevidebla urno, jen torente forverŝitaj el aera kornukopio, ĉiuj fajraĵoj estis floroj. Tio estis reva Paradizo revelaciita per siaj inkandeskaj aliformiĝoj; tio estis festego de fulmoj profane surprizita de homaj ombroj en la Nokto! Ho, sorĉaĵo! Ho miraklo! Emma kunfrapis siajn manojn. Emma suprenleviĝis sur la piedfingrojn: Ŝajnis, kvazaŭ ŝi volis sin suprenjeti renkonte al la lumajoj frenezigantaj, al la Elfoj forkurantaj! Tro bele estis! En iu momento, pro ĝoja ekscitiĝo, Emma kaptis mian manon. Tiu nevola, tiu senpensa manpremo ŝajnis al mi pli pikanta ol iu ajn indiferento: ofendite mi liberigis mian manon; mi eĉ decidis foriri. Sed... ŝi denove premis mian manon. Eble — kiu scias? — eble ŝi estis ne nur kontenta, sed ankaŭ kortuŝita! Mi komprenas hodiaŭ, pripensinte, ke neniam la junulino estis al mi pli proksima ol en tiu momento, kaj ke la festa artfajraĵo estis eble, suflore aŭ sugestie, ekbruliginta en ŝia kapeto komunikeman radfajraĵon. Ripetis do Emma la manpremon, kaj ĉifoje mi min ne liberigis. — Sia mano! Sia mano inter la miaj!

— Emma! — mi flustris. Kaj ŝi sin turnis (aŭ tiel al mi ŝajnis) kun la koro forte batanta sub ŝia malpeza bluzeto.

Sed tuj, jen furioza arĝenta siblanta raketo, ĉielen jetita, serpentuminte je fosforlumaj spiraloj, klakis, krevis, sepfoje krule brueksplodis terure, senhalte, kvazaŭ ĝi volus disŝiri per fajraj alfrapoj la tutan nigran vizaĝon de l' alta mallumo.

— Bele! Bele! — Emma trovis belega la demonecan serpenton, kaj ree fingromontris al la steloj kaj steletoj dissemataj de ĝia eksplodema kolero tra la ĉielo. Dume la bruo daŭris, eĉ pli-altiĝis, ĉar alproksimiĝis la momento de la fina radfajraĵo.

— Emma! — mi alparolis ŝin, tiufoje laŭte — mi tiel multe cin amas, kaj ci ankoraŭ ne rimarkis tion.

Mil sibloj respondis: nun la serpentaj raketoj multiĝis tie supre, kaj kruciĝis, sin mordantaj kaj disŝirantaj reciproke, kun infera bruegado. Mi pli-laŭtigis mian voĉon: mia koro estis tiam en konkuro kun la fajraĵo; kaj nun miaj vortoj resonis kvazaŭ mi deklamus ilin de sur scenejo.

— Rigardu min, Emma; dum longa tempo mi pensadas nur al ci. Pri ci mi estas freneza. Se ci momenton alproksimiĝus al mia koro, ci ĝin sentus pli alten salti ol tiuj ĉi malbenitaj raketoj...

— Zsss! Zsss! Patapan!

— Al mi ŝajnas, Emma, ke mi sentas ankaŭ cian koron batadi. Kiel ondadas cia brusto! Kiel bonodoras ciam braketoj!

— Pan! Pan! Zsss! Patapan-pan!

Alvenis la fina eksplodiĝo: ciklono. Tertremado. Senfina ruino, ŝajne surdiganta la tutan teran homaron.

— Emma! ciam okuloj estas pli brilaj ol tiuj flamoj! Nur ciam okulojn mi vidas, brilantajn en la mallumo! Ho! se ci scius! Se ci scius! — Nun mi kriegis freneze, malespere. Kaj Emma estis tie, tute proksima al mi; ŝia mano restis en la mia; tie estis mia amata, kun duonmalferma buŝo, kun ŝvela brusto, en sia malpeza vesto, kun sia bonodoro de freŝa herbo... — Se ci scius!...

La katastrofa „bum“ de la lasta paperbombo flagris, tragedia ekkria punkto post la tri vortetoj. Emma sin turnis fine, kun miro sentante, ke mi kriegas kiel frenezulo:

— Se mi scius... kion?

Terurita, mi turnis min por rigardi la fumantan postlasaĵon de la lasta eksplodo sur la ĉiela arkaĵo. Mi min sentis balanciĝanta, kvazaŭ mi elirus post senvola kaj senkulpa ebriiga trinkado. Mia kutima timemo, subite reveninte, lasis al mi nur sufiĉan kuraĝon por mensogo:

— Se vi scius — mi volis diri, kiel aspektas malgaja la nokto post la brilegado de la artfajraĵoj!

— Vere, — respondis Emma: oni sin sentas tiel laca! Kvazaŭ post bela revol! Ĵus, kredis min, mi vere havis impreson revil!...

— Ankaŭ mi!... mi balbutis. Kaj nenion alian mi aldonis: nek tiam, nek poste.

Nur restas al mi informi vin, ke Emma, frekventinte dum kvin jaroj fortepianan lernejon, en la fino edziniĝis al jaz-ludanto. En la vespero de ŝia edziniĝsoleno mi longe iradis, horojn post horoj, aŭskultante ĉiujn sonorilojn de la urbo.

El la itala: **Michele Solimena**

Vagado dum la kursotempo

Ĉirkaŭ mia oka jaro, — kun blua saketo por meti mian libron, mian kajejon kaj mian manĝon, — oni sendis min al lernejo.

En tiu tempo, revo de ĉiuj, kiuj iris kun mi al la lernejo estis fari „plantie”. „Plantie” signifas en Provenclando petolan forkuron de infano malproksimen de sia gepatra domo, ne avertante la gepatrojn kaj ne sciante kien li forkuras. Estas agrablega kaj nekomparebla impresoj, je tiu aĝo, senti sin absoluta mastro de si mem kaj tute senbrida.

Sed, venas malsato. Se tio okazas dumsomere, oni trovas kvadratajn bedojn da faboj, la ĝardenojn kun iliaj pomoj, iliaj piroj, iliaj persikoj kaj la ŝvelintajn melonojn, kiuj krias „manĝu min”.

Sed, se „plantie” okazas vintre, tiam necesas reveni.

Estas bubaĉoj, kiuj iras de farmo al farmo, kie oni ne konas ilin. Se la friponoj povas ŝteli ovojn, ili trinkas ilin krudaj. Sed, la plej fieraj forkuras malproksimen de la homoj kaj de iliaj domoj; ili pasigas la tutan tagon kuŝantaj en kampo de tritiko aŭ en longa fosajo. Ili manĝas morusojn, prunelojn, sovaĝajn cegojn kaj, se necese, glanojn.

Tamen, estas al la hejmo, ke la penso senĉese revenas kaj kiam oni estas detruintaj sufiĉe da nestoj kaj da pantalonetoj kaj per nematuraj pomoj aŭ acidaj fruktoj oni tre agacis siajn dentojn, nos-talgio premas la koron, oni reiras hejmen, kun klinita kapo.

Mi, kiel miaj kamaradoj kaj kiel ĉiu bona provencano, post tri monatoj kiel lernanto, mi faris mian „plantie”.

Tri aŭ kvar bubaĉoj, kiuj min atendis je la foriro de la lernejo, diris al mi:

„He! simplulo! venu ludi kun ni”. Kaj mi diris al mi mem: „Al la lernejo, mi iros morgaŭ.”

Kia feliĉo, mia Dio! . . . Sed ĉio finiĝas. Iun tagon, mia patro, informita de la instruisto, diris al mi: „Aŭskultu Fredrikon, se vi ankoraŭ ne iros al la lernejo, mi frakasos tiun verĝon sur vian dorson.”

Post tri tagoj mi denove ne iris al la lernejo. Ĉu mia patro kaŝobservis min? — Jen! dum mi vadadis en akvo, subite mi vidis, je tridek metroj antaŭ mi, aperi mian patron. Li alkriis: „Vi scias kion mi promesis al vi, mi atendos vin tiun ĉi vesperon.”

Kaj miaj kamaradoj kantadis:
— Aj! aj! aj! la bato; aj! aj! aj! sur via haŭto!

— Vere, mi diris, batota por ĉatota, mi tuj faros „plantie”.

Kaj mi ekiris. Mi ne scias kien. Kiam mi estis marŝinta dum unu horo aŭ unu horo kaj duono, ŝajnis al mi ke mi alvenis en Ameriko.

La suno malsupreniris, mi estis laca kaj timanta. Estas malfruvespere, mi pensis, mi devas peti gastigon en iu farmdomo.

Kaj malproksimigante de la vojo, mi direktiĝis al kampardometo, kiu havis plaĉan mienon. Hezite mi direktiĝis al la sojlo kaj mi vidis malpuregan maljunulinon. Por manĝi tion, kion ŝi tuŝis necesus malsategi.

La maljunulino, ĉiam gratante sin, estis almetinta teren, meze en kuirejo, bolpoton el kiu ŝi eltiris buljonon, kiun ŝi verŝis sur tranĉojn da ŝima pano.

— He! mia avino, ĉu vi faras supon?
— Jes, respondis ŝi, kaj de kie vi venas?

— Mi estas Mailanano, mi diris, mi faris „plantie” kaj mi petas de vi gastigon.

— En tiu okazo, diris plie la malbela maljunulino grumblante, sidiĝu sur la ŝtuparon por ne eluzi miajn seĝojn.

Mi sidiĝis sur la unuan ŝtupon.

— Mia avino, kiel nomiĝas tiu ĉi lando?

— Papaligoso.

— Papaligoso!

Vi scias, kiam oni parolas al infanoj pri malproksima lando, la saĝaj homoj diras kelkfoje „Papaligoso”. Tuj kiam la maljunulino diris al mi tiun nomon, malvarma ŝvito fluis sur mia dorso.

— Ha! ha! diris la maljunulino, kiam ŝi estis fininta sian laboron, en tiu lando la mallaboruloj ne manĝas . . . se vi volas suponi vi devos gajni ĝin.

— Volonte, kion mi faru?

— Ni ambaŭ staros ĉe la ŝtuparo kaj ni ludos salti; tiu, kiu saltos la plej malproksime manĝos la bonan supon . . . la alia manĝos per la okuloj.

— Mi tre volas fari tion.

Kaj mi ekster:

— Estos eksterordinare se tiu lamanata maljunulino saltos pli malproksimen ol mi.

Kaj, la piedoj kunmetitaj, ni tuj lokiĝis sur la ŝtuparo.

— Unu, diris la maljunulino balancante siajn brakojn por sin prepari al salto.

— Mi diras: du.

— Mi diras: tri.

Impete, per miaj tutaj fortoj mi saltis. Sed la maljuna maliculino, kiu ne saltis, tuj fermis la pordon, ŝovis la riglilon kaj kriis al mi:

— Bubaĉo! reiru al viaj gepatroj, kiuj ĉerte estas maltrankvilaj pro vi.

Mi restis konsternita, kiel truita korabeto.

Malantaŭ la domo estis vojeto, mi ekpaŝis sur ĝin, kaj vole-nevole ekmarŝis.

Post supreniro kaj malsupreniro de multaj montetoj mi estis laca . . . Pripensu, mi jam ne manĝis de tagmezo. Fine mi ekvidis en vinberujo kadukan dome-ton. Ĝiaj muroj fenditaj estis nigritaj de fumo; nek pordo nek fenestroj; kaj la traboj, kiuj estis subtenitaj nur de unu ekstremaĵo, treniĝis tere.

Laca, senforta, mi tre bezonis dormi, mi supreniris sur la plej dika trabon kaj mi profunde ekdormiĝis.

Mi ne scias kiom da tempo mi dormis. Sed meze de mia dormo ŝajnis al mi ke mi vidas subitan fajron, kaj tri virojn sidantajn ĉirkaŭ ĝi, kiuj parolas kaj ridas.

Post momento, fumado sufokis min; mi laŭte kriis pro timo.

Tri vizaĝoj turnis sin al mi kun teruraj okuloj . . .

— Ne mortigu min! ne mortigu min! mi kriis.

La tri bohemuloj, tiaj ili estis, same timigitaj kiel mi, ekridis. Ili malsupreniĝis min de mia grimpilo kaj demandis al mi de kie mi venas kaj kiel mi troviĝas tie.

Kaj tute trankviligita, unu el la ŝtelistoj diris al mi:

— Ĉar vi faris „plantie” vi certa estas



Ĉe la Unua Internacia Infan-Kongreseto en Kopenhago. La Dua Infan-kongreseto okazos en Marseille dum la 42a U.K. de Esperanto. (Vd. la Oficialan Kongresan Informilon.)

malsata... Jen, manĝu tion.

Kaj li jetis al mi kiel al hundo, safan tranĉaĵon duonkuiritan.

Post la manĝo ili leviĝis kaj parolis mallaŭte; poste ili diris al mi:

— Jen, junulo, ni ne volas fari malbonon al vi, sed por ke vi ne vidu kien ni iros ni tuj metos vin en tiun barelon.

— Metu min en tiun barelon, mi diris kun obea mieno.

Oni prenis min per la postajo kaj, klak! en la barelon.

Mi kaŭris en ĝi kiel fadena volvajeto kaj preĝis mallaŭte.

Sed, subite mi aŭdis ion, kio vagadis ĉirkaŭ mia barelo; mi retenis mian spiradon. Kio do estas ankoraŭ tio?... Mia koro batadis kiel horloĝo.

La taglumo ekaperis, kaj la piedpremadado malproksimiĝis; mi rigardadis tra la bareltruo... Kion mi vidas! lupon, tiel dikan kiel azeneton! kun brilantaj okuloj. Mi tiel timis noktan aperon, ke vidi lupon redonis al mi kuraĝon. La lupoj, kiu iom malproksimiĝis, revenis pro la movo, kiun mi faris, kaj jen ĝi, denove turniĝante ĉirkaŭ la barelon kaj vipante ĝin per sia vosto. Mi trapasis maneton tra la bareltruo, ekkaptis la voston, tiris ĝin internen, kaj tenis ĝin per miaj manoj.

La lupoj, kvazaŭ ĝi havus kvincent diaĵojn malantaŭ si, forkuris trenante la barelon tra ŝtonplenaj vojoj, tra vinberujoj.

— Aj! mia Dio! Sankta Maria! Sankta Josefo! mi ploradis, se la barelo rompiĝos la lupoj mortigos kaj manĝos min.

Subite la barelo rompiĝis, la vosto eliris el miaj manoj kaj malfermante la okulojn mi vidis tre malproksime mian lupon, kiu forkuris. Mi estis sur la vojo de Sankta Remi al Maillano, tre proksime al mia gepatra farmdomo.

Ne necesas diri, ke post tiaj emocioj la patra vergo ne plu timiĝis min.

Malantaŭ la farmdomo mia patro pluĝis, li levis sian kapon ridante kaj diris al mi:

— Kuru al via patrino, ŝi ne dormis la tutan nokton.

Mi rakontis al miaj gepatroj miajn belajn aventurojn. Sed, kiam mi parolis pri la ŝtelistoj, la barelo kaj la dika lupoj ili diris al mi:

— He! simplulo, estis la timo, kiu sonĝis tion al vi!

Malgraŭ miaj asertoj, neniuj volis kredi min.

FRÉDÉRIC MISTRAL

Esperantigis:

Claudine Bourdelon

MISTRAL (Frédéric) (1836—1914)
—franca poeto, naskiĝis kaj mortis en Maillane (elp. Majan), vilaĝeto de Provenco. Aŭtoro de „Mireille“ (elp. Mirej), belega kampara poemo en provenca lingvo. Poeto potenca kaj pura klasikulo; epopea verkisto kaj renoviganto de la provenca lingvo. Unu el la sep fondintoj, kaj la plej fama reprezentanto, de la literatura skolo nomita „Felibrige“. Mistral estis Nobel-premiito en 1904.



42-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Marseille — 3.10 aŭgusto 1957 — Francujo

Adreso: 32, Cours Estienne d'Orves, Marseille, Francujo. Telefonoj: Prado 55-46; Ferréol 98-18. Telegrafo: Esperanto.

Banko: James Rosa.

Ĝirkonto: Groupe Esperantiste — Marseille n-ro 156-15.

42-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Marseille — 3.10 aŭgusto 1957 — Francujo

Adreso: 32, Cours Estienne d'Orves, Marseille, Francujo. Telefonoj: Prado 55-46; Ferréol 98-18. Telegrafo: Esperanto.

Banko: James Rosa.

Ĝirkonto: Groupe Esperantiste — Marseille n-ro 156-15.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 3 Decembro 1956

Kotizoj: Ek de la 1-a de januaro validos la jenaj kotizoj: kongresano: 2.700 Fr.; edzino de kongresano 1.350 Fr.; Junul (in)oj ne pli ol 20 jaraj kaj studentoj: 1.000Fr. Individuaj membroj de UEA rajtas rabaton de 400 Fr.; edzino de kongresano 200 Fr.

Oni povas aliĝi pere de la oficialaj perantoj, per UEA aŭ rekte ĉe la 42-a Universala Kongreso en Marseille.

Komuna Loĝejo: Prezoj por loĝado en komuna loĝejo dum la Kongreso: 350 Fr. ĉiutage. Detaloj sekvos en la Dua Oficiala Bulteno.

Tendumejo: Prezo por loĝado en tendumejo dum la Kongreso: 50 Fr. ĉiutage, kun uzo de la higienaj servoj. Detaloj sekvos en la Dua Oficiala Bulteno.

Restoracioj: Oni povas manĝi en Marseille en restoracio laŭ franca menuo ek de 300 Fr inkluzive servmonon.

Ekskursoj: L.K.K. organizas unu ĉefekskurson kaj du aliajn ekskursojn en la folkora Provenco (kun spektaklo en la grek-romana teatro de Arles), al la Blua Mediteraneo (Lazura marbordo ĝis Cavalaire) kaj al la sovaĝaj kanjonoj de Verdon. Detaloj en la Dua Oficiala Bulteno.

Karavanoj: Anoncis karavanan: Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Avenue, London W. 11; Itala Esperanto-Federacio, Via Saluzzo 44, Torino;

Sveda Esperanto-Federacio, Tegelbacken, Stockholm; Nederlanda Asocio L.E.E.N., s-ro Jakob Telling, Schietbaanlaan 106 A, Rotterdam C.

Peranto: Oficiala Peranto de L.E.E.N. estas s-ro J. Telling, Schietbaanlaan 106 A, Rotterdam C.

Fakkunvenoj: Anoncis fakkunvenon: „Eŭropa Kampanjo“, d-ro W. Herrmann, Birstädter Str. 3, (16) Lampertheim (Hess.), Germanujo; Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, 183 Woodlands Park Road, Bournville, Birmingham 30, Britujo.

Antaŭkongreso: Kiel anoncote, ĝi okazos en Parizo de la 31-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1957. La programo antaŭvidas du prelegojn de Internacia Somera Universitato, vizitojn en la urbo, kabaredon de R. Schwartz, ekskurson al Versaille kaj aliajn punktojn. Kotizo: 600 Fr. Povas aliĝi nur kongresanoj jam aliĝintaj al la 42-a Universala Kongreso en Marseille..

Infana Kongreseto: La Dua Internacia Infan-Kongreseto en la kadro de la Universalaj Kongresoj okazos en la knabinlernejo en Rue de Turenne, afable disponigita de la aŭtoritatoj. Estas akceptitaj infanoj parolantaj Esperanton, de 6 ĝis 13 jaroj. La gepatroj devos skribi atesti, ke la infanoj sufiĉe konas la lingvon. La aliĝo al la Universala Kongreso estas senpaga por infanoj ĝis 13 jaroj.

Statistiko: (ĝis fino de novembro) Alĝerio 1, Aŭstrujo 3, Belujo 4, Brazilo 3, Britujo 28, Bulgarujo 2, Danlando 7, Finnlando 5, Francujo 84, Germanujo 16, Hispanujo 3, Italujo 29, Jugoslavio 11, Japanujo 2, Maroko 4, Nederlando 11, Norvegujo 3, Nov-Zelando 1, Pollando 3, Svedujo 16, Svisujo 10, Usono 2. Entute 248 el 22 landoj (Pasintjare 288 el 20 landoj).

Gian Carlo Figliera
Konstanta Kongresa Sekretario

Ĉu vi jam varbis Apogantojn de UEA?

Komuniko de la Estraro

La Estraro de UEA informas ĉiujn aliĝintajn landajn asociojn, ĉiujn kunlaborantajn fakajn kaj specialigitajn organizaĵojn, la tutan membraron, kiel ankaŭ ĉiujn aliajn esperantistojn, ke la ĝenerala sekretario de EANA, s-ro G. A. Connor, informis per sia letero de la 6-a de novembro 1956, ricevita de la Prezidanto de UEA la 9-an de novembro 1956, ke EANA ekzigis el UEA.

La Estraro atentigas pri jenaj esencaj faktoj:

1. La antaŭa Komitato ekzigis s-ron G. A. Connor pro lia agado kontraŭa al la art. 3 kaj 4 de la Statuto.

2. Laŭ la propono de d-ro Solzbacher, la nova Komitato de UEA, kiu ekfunkciis la 1-an tagon de la kongreso en Kopenhago, rekonsideris la aferon kaj, trastudinte la tutan aktaron, konfirmis la decidon pri la ekzigado per 24 voĉoj kontraŭ 2 kaj 2 sindetenoj. La Estraro, kiu faris la proponon pri ekzigado, sindetenis de la voĉdono lasante tiel la decidon plene al aliaj komitatanoj.

3. La Komitato akceptis la 10-an de aŭgusto unuanime (kun 2 sindetenoj) Rezolucion, per kiu ĝi konstatis „ke la Estraro de UEA en sia laboro por Esperanto kaj por la Asocio rigore observis la principon de absoluta neŭtraleco rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj” kaj deklaris sian indignon pro la atakoj kaj kalumnioj aperintaj en „Amerika Esperantisto” rilate UEA kaj ĝiajn gvidajn instancojn.

4. Laŭ la jul./aŭg. numero de „Amerika Esperantisto”, la 46-a kongreso de EANA ne nur solidariĝis kun la agado pro kiu s-ro Connor estas ekzigata de UEA, sed eĉ kuraĝigis lin kaj liajn helpantojn al daŭrigo de tiu detrua laboro, kontraŭa al la fundamentaj intereso de Esperanto kaj de UEA. Jam en Kopenhago la Komitato estis informita, ke tiu rezolucio de EANA estis akceptita per naŭ voĉoj kontraŭ ok, dum la aliaj el la 32 ĉeestintoj sin detenis. Tiu informo estis poste konfirmita de la delegito de UEA s-ro J. E. Bush en lia letero de la 5-a de novembro al la Prezidanto de UEA. Kvankam estas tragike bedaŭrinde, ke nur naŭ personoj per sia voĉdono povis fari tiun fatalan rezolucion kaj tiamaniere kompromiti la esperantistecon de tuta landa asocio, tamen el jura kaj statuta vidpunkto la Komitato sentis sin devigita akcepti tiun rezolucion kiel validan dokumenton pri la starpunkto de EANA. Sekve, la Komitato de UEA per ĉiuj voĉoj kontraŭ 1 kaj 1 sindeteno decidis iniciati la procedon por ekzigado de EANA el UEA laŭ la par. 27 de la Ĝenerala Regularo surbaze de la art. 20 de la Statuto en kunligo kun la art. 3 kaj 4. Samtempe la Komitato elektis komisionon de 3 komitatanoj por ricevi la defendon de EANA, por entrepreni

eventualajn pliajn esplorojn kaj por fari al la Komitato definitivan proponon (detalojn pri tio ĉi vidu en la koncernaj protokoloj de la Komitato, publikigitaj en la Jarlibro de UEA 1956 dua parto).

5. Plenumante la decidon de la Komitato la Prezidanto de UEA turnis sin per registrita letero de la 29-a de aŭgusto al la Prezidanto de EANA, informis lin pri la plendoj de la Komitato de UEA kontraŭ EANA kaj atentigas lin, ke laŭ la Ĝenerala Regularo EANA rajtas sendi sian defendon en tempolimo de 30 tagoj. Nek en tiu tempolimo, nek iam poste UEA ricevis ian ajn defendon fare de EANA. El tio ĉi devas konkludi, ke EANA ne povis pruvi la kalumniajn asertojn de sia ĝenerala sekretario, senprecedencajn en la tuta historio de la Esperanto-Movado. Tiu fakto — kaj ne la motivoj menciitaj en la ekzigata rezolucio, kiu entenas nenion alian ol ripetadon de la kalumnioj, kiujn kondamnis la Komitato de UEA kaj pro kiuj s-ro G. A. Connor estas ekzigita el la Asocio — estas la vera kaŭzo, pro kiu la Komitato de EANA decidis ekzigiti el UEA.

6. Per sia letero de la 29-a de nov. la Prezidanto de UEA informis la Prezidanton de EANA, ke UEA notis la ekzigon. Samtempe la Prezidanto de UEA, bazante sin sur la rezolucio de la Komitato de la 10-a de aŭgusto, kun indigno rifuzis la motivojn pri ekzigado. Li ankaŭ deklaris, ke UEA ne akceptas kiel daton de ekzigado la 29-an de aŭgusto, arbitre elektitan de EANA, sed la daton de la 9-a de novembro 1956, nome la daton de la tago kiam li ricevis la komunikon pri ekzigado.

7. La Estraro de UEA plene konsentas kun la menciita letero de la Prezidanto de UEA, en kiu li en la fino diris: „Mi esprimas bedaŭron pro tiu ekzigado, kiun kaŭzis nur la agoj de unu homo kaj grupo da liaj kunlaborantoj kaj mi ne perdas la esperon, ke la membraro de EANA trovos baldaŭ la ĝustan vojon por revenigi sian asocion al UEA. EANA tion povos fari tuj, kiam ĝi malsolidariĝos kun la kalumniaj asertoj de sia ĝenerala sekretario pri UEA kaj kiam ĝi montriĝos preta respekti la Statuton de UEA kaj tute speciale ĝian principon de rigora neŭtraleco”.

8. Intertempe, la sola oficiala reprezentanto de UEA en Usono estas nun Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA) kaj la ĉefdelegito por UEA en Usono D. E. Parrish, 328 West 46th Street, Los Angeles 37, California. Pri tio la Estraro de UEA speciale atentigas la usonajn geesperantistojn kaj petas ilin — tute egale ĉu ili estas membroj de ELNA aŭ ne — resti fidelaj al la neŭtrala kaj universala UEA, kiu laboras por la bono de Esperanto en la spirito de la ideoj de d-ro Zamenhof kaj de la fondinto Hector Hodler. Ĉiujn aliajn Esperanto-organizaĵojn kaj unuopajn geesperantistojn en la mondo la Estraro, informante objektivite pri la supraj faktoj,

petas tiri el ili la necesajn konsekvencojn rilate la ekzigitan s-ron Connor kaj la ekzigintan asocion dum tiu sinjoro estas ĝia ĝenerala sekretario kaj membro.

3-12-1956.

Prof. D-ro Giorgio Canuto,
prezidanto

Prof. D-ro Ivo Lapenna,
ĝenerala sekretario

Harry W. Holmes O.B.E.,
vic-prezidanto

P. M. Mabeesoone,
vic-prezidanto

René Llech Walter
D-ro W. Herrmann
D-ro Inĝ. G. Azzi

DEKLARO DE K.E.L.I

„Dia Regno”, la oficiala organo de Kristana Esperantista Ligo Internacia publikigis en sia nov-dec. numero 1956 la sekvantan deklaron:

Kelkaj personoj en Usono, membroj de E.A.N.A. (Esperanta Asocio de Norda Ameriko) publikigis en la lasta tempo akrajn akuzojn kontraŭ la estraro de U.E.A. kaj ĝia ĝenerala sekretario, d-ro Lapenna. Tiuj akuzoj atingis sian kulminon en iu cirkulero, dissendita la 12-an de julio 1956 sub la titolo „To Fellow-Esperantists who love Freedom” (Al Kun-Esperantistoj, kiuj amas Liberecon).

Ĉi tiu pamfleto, verkita de iu membro de K.E.L.I., asertas ke U.E.A., sub gvidado de D-ro Lapenna, fariĝis „komunista frontorganizo”. En la fino la verinto instigas la U.E.A.-membrojn amase forlasi U.E.A., kaj aliĝi al organizaĵoj kiel I.K.U.E., K.E.L.I., T.E.K.A. ktp.

La estraro de K.E.L.I., substrekkante, ke ĝi neniel volas miksi sin en la internajn aferojn de U.E.A., deklaras:

1. ke ĝi nepre kondamnas la agojn kaj metodojn de tiu K.E.L.I.-ano,
2. ke ĝi povas plene kun-subskribi la rezolucion de la 10-a de aŭgusto, akceptitan de la Komitato de U.E.A., rilate la laboron de la estraro de U.E.A. kaj de ĝia ĝenerala sekretario, kaj do neniel trovis ian tendencan politikan en la agado de U.E.A.,
3. ke ĝi hontas, ke parto de la insultoj kaj atakoj venis de iu K.E.L.I.-ano,
4. ke ĝi bedaŭras, ke la nomo de K.E.L.I. estas uzita en la cirkulero de la 12-a de julio kaj ke ĝi neniel deziras tian mispropagandon,
5. ke ĝi firme esprimas sian deziron, ke inter U.E.A. kaj K.E.L.I. restu la sama spirito de amika kaj simpatia kunlaboro kiel antaŭe.

La prezidanto,
H. A. DE HOOG
La vic-prezidanto,
ERIK CARLÉN
La sekretario,
D. DE BOER

Novaj Libroj

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.
*) ricevebla ĉe U.E.A.

ESEJOJ I: BELETRO* de Prof. Gaston Waringhien. *Stafeto Belliteratura eldonserio*, 6. Eld. J. Regulo, la Laguna, Kanariaj Insuloj 1956. 236 p. 16 x 22,5. Prezo: 1.80 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro plus sendkostoj.

Ankoraŭ unufoje Stafeto nin surprizis per triumfe unuaranga ĉefverko de nia literaturo — libro, kiun oni legos kaj relegos, neniam elĉerpante la intereson kaj stimulon de la varia enhavo. Lastatempe Prof. Clelia Conterno skribis: „Senvaloraj amatoroj svarmas ĉe ni... Mankas bonaj verkistoj, ni laŭdas la malbonajn... ĉiu ajn skribaĵo estas bela por ni nur, ĉar ĝi estas en Esperanto.” Ŝi certe konsentos, ke ŝiaj eble iom tro severaj esprimoj ne povas esti aplikataj al tiu ĉi nova volumo de Prof. Waringhien; oni ne povas prezenti al si libron pli profesie, klare kaj talente verkitan. Mi ne hezitas aserti, ke per kelkaj el ŝiaj eseoj (mi nomu nur tiun pri „Hamleto” kaj tiun pri Dante) li konstateble riĉigas la kritikan literaturon de la tutmondo; mi volas diri, ke li aldonas ion al la tuta sumo de la homara kono.

Ĉar eble tiuj vortoj povus fortimigi kelkajn legontojn, kiuj timus ĉion esoteran aŭ „altkulturan”, mi rapidas aldoni, ke Waringhien havas kvaliton de majstra eseisto: nome, lia stilo estas tiel klara kaj intima, ke eĉ komplikajn aferojn li scias prezenti simple kaj al ĉiu kompreneble. Legante lian libron, oni havas impreson, ke oni sidas komforte en fotelo kaj aŭskultas amikan konversacion de interesa gastiganto; oni respondas agrable al la pikanteco de liaj ideoj, kiuj elverŝiĝas kvazaŭ spontane kaj senĝene. Kiom da klero estas necesa, por atingi tiun senĝenecon pri ŝiaj konoj! Al mi ŝajnas (pace Prof. Conterno!) ke Waringhien estas unu el la grandaj eseistoj de nia jarcento.

La ESEJOJ I dividiĝas en tri partojn. En la unua parto la aŭtoro skribas kvazaŭ „Sur la marĝenoj de...” sep libroj: *la Biblio; Hamleto; La stranga butikio; Infernoj; Eterna bukedo; Fabeloj de Andersen; Dekdu poetoj*; donante al ni novajn pensojn pri tiuj malnovaj konatoj-ŝatatoj. Laŭ mia opinio, tio ĉi estas la ĉefa parto de la tuta ĉefverko; en ĝi Waringhien plej trafe iluminas malmajn angulojn de la tuthoma kulturo. En la fino mi bedaŭras nur, ke li elektis nur du originalajn verkojn el la pure esperanta kulturo por sia temo; volonte ni ekkonus liajn pensojn pri kelkaj aliaj el

nij originalaj gravaj verkoj. Sed estas iom maldanke plendi, kiam li tiel brave jam nutras nin...

El la *Biblio* li elektas tri lokojn, kiujn oni ofte citas en la esperanta literaturo, ĉar ili iel rilatas kun nia lingvo — la turon de Babel, la profetaĵon de Cefanja kaj la aferon de la Pentekosto — kaj majstre sekcas ilin. Pri *Hamleto* — nu, ekzistas en multaj lingvoj tutaj bibliotekoj da verkoj pri tiu grandioza kaj eterne mistera dramo; oni estus supozinta, ke ĉio serioze dirinda pri ĝi estas dirita, kaj tamen nia eseisto sukcesas ĵeti novan lumon sur la malnovan temon. Unue li tiklas nian scivolon pri la lla volumo de liaj eseoj (*Lingvo kaj vivo*), en kiu li diskutos vere interesan temon: „*Mi ekzemple komparis la tekston de la Hachette-a eldono kun tiu de la Varsovia, kaj malkovris inter ili nombron da nesuspektitaj ŝanĝoj*”... Sed tuj li lasas la pure tradukan aspekton de la dramo, kaj sin koncentras pri nova divido de la tradicie kvinakta dramo en tri partojn. Seka temo? — nur legu la eseon, kaj vi konstatos kontraŭe!

Sub signo de „*La stranga butikio*” ni trovas studon pri la vortludo, kiun ni povas kun intereso kaj profito kompari kun la samtema studo de Reto Rossetti en „*El la maniko*”. Pri *La infero* li..., sed kiel profitus, citi la tutan menuon? Kiu amas la literaturon, tiu ĝuos ĉiujn ĉi sep eseojn.

Tamen en la kadro de unu el ili, bonega kaj de senescepte ĉiu esperantisto leginda traktato pri „*La tradukarto*” („*Eterna Bukedo*”), mi trovas la solan lokon, kie mi rekte malkonsentas kun opinio de la aŭtoro. Li asertas, ke la tradukanto de poezio — kaj tute aparte la tradukanto el la anglalingva poezio — devus aŭ plilongigi la verson aŭ aldoni pliajn versojn. Tiun tezon li apogas per statistika rezonado (kalkulo de silabnombroj de *prozaj* tekstoj); tamen al mi ŝajnas ke poezio kaj statistiko havas malmulton komunan. Al mi ŝajnas ke plilongigo de la versoj malrisortas tiun dinamikon de la poezio, kiu, laŭ mi, estas ĝia ĉefa ingredienco. Mi sugestus ke la scivolema leganto komparu la du kaloĉajajn versiojn de la soneto de Konstantin Veliĉkov (Bulgara Antologio p. 52, kaj *Eterna Bukedo* p. 265), el kiuj la pli frua estas verkita per aleksandroj, la revizio per kvinjamboj, je granda profito de la dua versio. Rilate miajn 125 tradukojn el la angla kaj skota lingvoj,

mi nur dufoje trovis konsilinde plilongigi la verson: per tio mi ne volas diri, kompreneble, ke ne eblas fari bonan tradukon per pli longaj versoj; mi atentigas, tamen, ke oni ne faru el tio regulon kiu kuraĝigus la naturan pigrecon de la diletanta aŭ novica tradukanto. Cetere, la praktiko mem refutas la teorion de Waringhien: la grandega plimulto de unuarangaj tradukoj en Esperanto fidele sekvas la originalan formon, kun nur malgrandaj modifoj truditaj de la naturo de la lingvo; inaj anstataŭ viraj kvinjamboj, k.s. Krome, mi opinias, ke Waringhien mem, pli frue en la sama eseo, vojmontras al la eraremo de sia konsilo, kiam li (pravege) avertas, ke oni traduku „ne la vortojn sed la sencon — *non verbum e verbo, sed sensum exprimere de sensu*”. Mi proponas la tezon, ke la angla lingvo estas poezie malpli kompakta lingvo ol Esperanto ĝenerale, kaj ke tial, ĝenerale, formfidele traduko en Esperanton estas ebla.

La dua parto de la volumo estas dediĉita al kvin „*Esperantistaj siluetoj*”, el kiuj tiu pri Grosjean-Maupin estas eble la plej grava.

En la tria parto, „*Skizoj pri kompara literaturo*”, kiu ampleksas proksimume duonon de la volumo, Waringhien atentigas pri la granda servo, kiun faros al la homoj Esperanto sur tiu ĝis nun apenaŭ esplorita kampo: „*Ĉu oni ne trovas veran ĝuon, se oni povus kompari, en la sama lingvo, la Ifigenion de Goethe kun la Ifigenia de Euripido, kaj vidi, kiel la moderna poeto adaptis la antikvan ĵabelon al nuntempaj sentoj*... Kia paŝiiga distro, observi de Marlowe al Goethe, de Goethe al Madach la transformon, evoluon kaj vastiĝon de la persono de Faŭsto!... Jen kelkaj el la multaj plezuroj, kiujn rezervas al ni la kompara literaturo, kiam ni povos komforte praktiki ĝin en kaj per nia lingvo. Dum ĝi restis ĝis hodiaŭ la ĵaluza apanaĝo de malmultaj poliglotoj, ĝi tiam farigos la komuna bono de ĉiu kulturita homo. Same kiel la muziko kaj la kino, la literaturo plu ne konos la landajn barojn. Anstataŭ lerni artefarite izolitan historion de sia nacia literaturo, la estontaj liceanoj lernos ĝin en la kadroj de la tutmonda; ili klare vidos la ideofluojn, kiuj trakuris de unu popolo al alia... ili sentos, per efektivaj ekzemploj, la ĝeneralan komunecon de ĉiuj civilizoj, la humanan solidarecon de ĉiuj kulturoj, kaj ili ĉesos iom post iom pensi per terminoj strikte naciaj”. Kaj en sep eseoj la vasta erudicio de nia eseisto kondukas nin tra la mondkulturo, malfermante al ni ĉiam novajn pordojn ĝis nun ŝlositajn: apud Milton, Heredia; apud Hafiz, Baŝo; apud Voltaire, Carducci; ĉio kunfadenita per la saĝo, sagaco kaj sprito de unuaranga intelekto, da kiaj nia lingvo tiras al si rimarkindan nombron. Tiu ĉi volumo estus alte takсата en iu ajn literaturo: ni estu dankaj, ke ĝi apartenas al la nia!

Fine, mi ne volas preteratenti la belegan aspekton kaj belgustan prestehnikon de la libro. Mi ne povas ne miri, kiel

grafikisto John Hartley per ĉiu nova kovrilo de la serio atutas la ŝajne nesupereblajn antaŭajn kovrilojn. Belaspekta, riĉenhava, unika... tiu ĉi libro renkontos ĉe la esperantistoj meritatan aprecon. W. Auld

TRI VERKOJ de VOLTER (VOLTAIRE): KANDID aŭ LA OPTIMISMO; ZADIG aŭ LA DESTINO; SENARTIFIKULO.* En traduko de E. Lanti. Eldonis Sennacieca Asocio Tutmonda, Parizo, 1956. 312 p. en formato 19,5 x 13 cm. Prezo 2,30 dol. aŭ ekvivalento.

Junulo inter la du mondmilitoj, ricevinte tro liberalan edukon kaj senkonscie forminte filozofion, ke la homaro senĉese progresas, mi la unuan fojon legis la faman rakonton pri Candide kun miksitaj sentoj. La aventuroj de Candide estis ja tiel verve kaj sprite priskribitaj, ke mi devis finlegi ilin en unu gluto. Tamen ŝajnis al mi, ke Voltaire certe amasiĝis la koincidojn kaj kruelaĵojn preskaŭ ĝis grado de ekstravaganco.

Relegante la verkon post dudek kvin jaroj, mi jam ne opinias ĝin fantazia. Eĉ pli strangaj aferoj okazis en mia propra vivo, aferoj, kiujn Voltaire mem malfacile imagus. Sed, se li vivus nun, majstre li montrus al ni la stultajojn, kiujn ni pensas, kaj la malhomaĵojn, kiujn ni toleras. En tio kuŝas la aktuala valoro de la ironiaĵoj de Voltaire. Legante ilin, ni nepre devas kompari lian mondon kun nia. Kiel malmulte ni efektive ŝanĝiĝis!

CANDIDE estas la plej fama verko de Voltaire, sed ZADIG estas preskaŭ egale konata. Kabe jam en 1907 tradukis ĉapitron el ĝi por sia UNUA LEGO-LIBRO, kaj la sama ĉapitro en traduko de s-ro Albert Fehr aperis en HEROLDO DE ESPERANTO 1198 (1954). La Esperantista Grupo de Marseille tradukis la tutan verkon por la paĝoj de NIA GAZETO en 1938.

En la 18-a jarcento romanoj pri la oriento estis popularaj, same kiel romanoj pri la planedoj disvendigis hodiaŭ, kaj pro la samaj kaŭzoj. Voltaire sekvis la modon por siaj propraj celoj. Lia heroo Zadig estas pli prudenta ol la junulo Candide sed malgraŭ tio travivas egale severajn batojn de la sorto. Kutime Voltaire ne alte taksas la moralan valoron de virinoj, sed li permesas al la fine bonŝanca Zadig, ke almenaŭ unu el liaj amatinoj restu fidela al li.

Per SENARTIFIKULO (L'INGĜENU) Voltaire uzis alian rimedon por moki la ekleziajn kaj civilajn morojn de sia jarcento. La Senartifikulo estas indiano, kiu, ricevinte biblion, supozas, ke ĝiaj ordonoj estas efektive obeataj en Eŭropo. Oni povas imagi en kian embarason tia kredemulo implikiĝas kaj kiom lia konduto kaj liaj demandoj ĝenas aliajn homojn. Tamen, malgraŭ lia malŝato por la organizita religio, oni pli klare ol en liaj aliaj verkoj konstatas, ke Voltaire ne estis sendiulo. Laŭ lia filozofio „ni estas sub la potenco de la Eternulo, kiel la astroj kaj la elementoj; li faras ĉion

en ni; ni estas radetoj de la senlima maŝino, kies animo li estas; li agas laŭ ĝeneralaj leĝoj, kaj ne laŭ apartaj vidpunktoj; ĉio cetera estas por mi abismo el mallumo”.

La mensoj de Lanti (Eugène Adam 1897—1947) kaj Voltaire (François Marie Arouet 1694—1778) intime parenkas. Ambaŭ uzis acidajn plumojn kaj kreis amarajn malamikojn, sed celis plihomigi la homaron. Voltaire estis unu el la unuaj uzantoj de mallongaj frazoj, kaj Lanti ĉiam strebis al konciza kaj racia stilo. Do Lanti estis ideala tradukanto por Voltaire. Lian KANDID ni ekkonis jam en 1929. La nuna reeldono, kvankam reviziita de Lanti, estas preskaŭ neŝanĝita. En la aliaj du tradukoj oni vidas evoluon de stilo. La erara „ĉagrena” de KANDID fariĝas „ĉagrenita” en ZADIG. La uzo de „ĝi” en frazoj, kiel „ĝi estis smeraldoj”, „ĝi ne estas ediktoj”,

Esperanto-movado kreskas en Polujo

La plej granda evento en la pola esperanta movado estis la okazinta en Varsovio la 27 kaj 28 de oktobro IVA postmilita Tutpollanda Esperanto Kongreso. La belega kongresejo en la Palaco de Kulturo kaj Scienco, partopreno de eksterlandaj gastoj el Ĉinujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Hungarujo, Nederlando aldonis internacian kaj solenan karakteron al la Kongreso, okazinta post la okjara interrompo, kiun partoprenis ĉirkaŭ 450 gesamideanoj kaj invititaj gastoj.

La gazetaro kaj radio estas ĉiam pli favoraj; dum la naŭ monatoj de la kuranta jaro laŭ la neplenaĵ informoj aperis ĉirkaŭ 200 artikoloj, mencioj, anoncoj pri Esperanto. La 27 de oktobro Pola Radio disaŭdigis en la fako „Muziko kaj aktualaĵoj” interparolon kun gesamideanoj Baghy (Hungarujo), Dolapčiev (Bulgarujo), Borcic (Jugoslavio) kaj Dratwer (Polujo). La sama elsendo estis ripetita dimanĉe matene. La saman tagon

„ĝi ne estas ili, kiuj delogis min”, estas malofta hodiaŭ. La nesukcesa eksperimento „alio” ne troviĝas en ZADIG kaj SENARTIFIKULO, sed oni rimarkas alian eksperimentaĵon en ZADIG — „bel' Azora”, „bel' Misufa”, „bel' Astarta”, „bel' Falida”, k.c. — kaj similaĵon en SENARTIFIKULO — „Sinjor' Luvua”. Manko de kutima akuzativo kelkfoje ĝenas, ekz. „la plezuro vidi kaj aŭdi viron, kara al ŝia edzo kaj al la Ŝtato”, „mi faris versojn, laŭdantaj la reĝon”. En ĉapitro XVI de ZADIG tuta paĝo de la originalo mankas, sed tio estas rimark-ebla nur al detalemuloj. Preseraroj preskaŭ ne troviĝas. La malmultaj skribararoj verŝajne troviĝas en la manuskripto. Tiaj skribararoj, kiam temas pri stilstio kiel Lanti, estas preskaŭ sanktaj relikvoj. La Literatura Komitato de SAT kontrolis la verkon.


Edward Ockey

dimanĉe dum la „Vespera Radijurnalo” oni elsendis intervjuon kun s-noj Yeh Chun Chien, Baghy kaj prezidanto de la Asocio s-no Andreo Rajski.

La Asocio eldonis jenajn gravajn verkojn en Esperanto: Mickiewicz „Sinjoro Tadeo”, Jastrun „Adam Mickiewicz”; Tuwim „Versaĵoj”, Prus „Faraono”, Albumo pri Varsovio, „Pollando” nr. 7 kaj 11 (Esperantistoj estas petataj urĝe anonci sian abonon por 1957 jaro! Se alvenos sufiĉaj abonoj (4 dol. jare), do „Pollando” aperos regule ĉiumonate).

Pri la ĉiam kreskanta interesiĝo pri Esperanto atestas la fakto, ke la oficejo de la Ĉefa Estraro ricevas ĉiutage 80 - 100 - 120 leterojn. La kvar salajrataj oficistoj minimume duobliĝas, por ĉion plenumi kaj ke ĉio bone kaj glate marŝu. La ĝenerala sekretario ĉiutage honore oficas 4—6 horojn. Ankaŭ la aliaj estraranoj helpas laŭeble.

Isaj Dratwer, Varsovio



Prezidantaro de la XII (IV) Pollanda Esperanta Kongreso Sidas de maldekstre en la unua vico: mag. I. Dratwer, ĝenerala sekretario de AEP, d-ro J. Jermar (Ĉeĥoslovakio), L. Márton (Hungarujo), pastro H. Paruzel, mag. T. Michalski, parolas prezidanto de AEP A. Rajski, J. Baghy (Hungarujo), L. Borcic (Jugoslavio), red. Jeh Chun-Chien (Ĉinujo) G. Dolapčiev (Bulgarujo). En la dua vico estas videbla s-ino S. van Maurik (Nederlando).

Pri-Esperanta Interparolo

La Pax Christi-kongresanoj, interesitaj pri la problemo de lingvo internacia, kunvenis la tagojn 13-an kaj 14-an de septembro 1956, okaze de la „pri-Esperanta interparolo“ organizita en la kadro de la IV Internacia Kongreso de Pax Christi.

La interparolo estis aranĝita de la reprezentantoj de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, Vleuten (Nederlando): s-roj Pierre Royer (Paris), J. Juan Forné (Valencia), kaj Maximilian Mielert (München), membroj de Pax Christi.

La komitato, prezidita de s-ro Pierre Royer, reprezentanto de Franca Katolika Ligo Esperantista,

1) prezentis la celojn kaj organizon de I.K.U.E., emfazante, ke tiu ĉi asocio estas katolika movado aprobita de Lia Sankta Moŝto Papo Pio X, kiu havas kiel celojn disvastigi la katolikan kredon inter la esperantistaro kaj enkonduki la internacian lingvon Esperanto inter la diversaj movadoj internaciaj ekleziaj;

2) prezentis la historion, atingojn kaj strukturon de Esperanto kaj ĉiujn necesajn informojn por ke la ĉeestantaro estu klare informita pri la esenco kaj rolo de la Esperanto-movado.

REZOLUCIO

La membroj de Pax Christi, kunvenintaj por la Pri-esperanta Interparolo, aŭskultinte la raporton de la komitato:

1) notas la rezultojn atingitajn de Esperanto sur la kampo de internaciaj interŝanĝoj, de literaturo, scienco kaj kulturo,

+++++



FELIĈAN NOVJARON

al la legantoj deziras

la Redakcio

+++++

Certe la membroj facile komprenas ke estas pro la festotagoj kaj deviga ferio en la presejo, ke tiu ĉi numero suferis gravan prokraston.

- 2) emfazas la ekziston de asocio de katolikaj esperantistoj, Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, kaj agnoskas la partan komunecon de celoj inter tiu asocio kaj Pax Christi;
- 3) Konsideras, ke la stariĝo de rilatoj inter I.K.U.E. kaj Pax Christi estas daŭrigendaj por la profito de ambaŭ asocioj;
- 4) Kuraĝigas la membrojn de Pax Christi,

lerni la internacian lingvon Esperanto kaj partopreni en la katolika korespondado en Esperanto, kiu estas nova sekcio de „Correspondance catholique internationale Pax Christi“;

5) Invitas la asocion I.K.U.E. informi Pax Christi pri ĉiuj laboroj kaj atingoj efektiviĝitaj de ĝi kaj kies protokoloj estos eventuale publikigitaj en la naciaj bultenoj de Pax Christi.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Dimanĉo	14.00-14.15	Piraĉununga, 198m. K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraĉununga (Sao Paulo), Brazilo.
	23.20-23.35	Bilbao. 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo. (Horo variabla dum unuhora diverslingva programo.)
Lundo	12.30-13.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	22.40-22.57	Hilversum, 298m, 188m P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	00.45-01.00	San José. 192m. P. Radio Welcome CW47A, San José, Urugvajo.
	11.55-12.00	Bern. 48.66m, 31.46m, 13.94m, 11.70m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse, 23, Bern, Svislando.
	15.00-15.10	Ljubljana. 327m, 221m. K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
	17.35-17.40	Bern. 48.66m, 31.46m, 16.87m, 13.94m. P. D-ro Baur.
	17.55-18.10	Roma. 50.34m, 41.24m, 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
	19.00-19.15	Stockholm, 26.10m, 19.90m. P. Radio I.B.R.A., Esperanto programo. Poŝtfako 822, Stockholm 1, Svedujo (nur la lastan mardon de ĉiu monato).
	19.15-19.30	Carlet. 288m. I. Radio Carlet (Valencia), Hispanujo.
Merkredo	16.00-16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	21.55-22.05	Wien. 208m, 48.74m, 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.50-23.00	Hilversum, 402m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum.
Ĵaŭdo	08.30-08.45	Paris. 348m, 249m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. D-ro Privat.
	17.35-17.40	Bern. Kiel marde P. D-ro Privat.
	22.30-23.00	Valencia. 200m. I.K. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.45-23.00	Zagreb. 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.30-24.00	Sao Paulo, 62.83m, I.K. Rádio Progresso. Sao Paulo, Brazilo.
Vendredo	00.45-01.00	San José. Kiel marde.
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	19.15-19.30	Carlet. Kiel marde.
	21.30-21.45	Guatemala Cd. 470m, 197m, 47m, 30.50m. I. Radio-Esperanto, La Voz de Guatemala, Mez-Ameriko.
Sabato	11.05-11.30	Rio de Janeiro. 214m. K. Rádio Roquete Pinto PRD5, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	17.30-18.00	Rio de Janeiro. 375m, 30.70m, 25.10m, 16.80m. K.I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	18.45-19.00	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15-22.22	Hilversum. 298m, 188m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Roma. 1-I, ĉe la sojlo de la nova jaro; 2-I, Kuriero de Esperanto; 4-I, Tago de la blinduloj; 7-I, Januaro; 9-I, Kuriero de Esperanto; 11-I, Itala belarta urbo Sulmona; 15-I, Novajoj el Italujo; 16-I, Kuriero de Esperanto; 18-I, Leterkesto kaj bibliografio; 22-I, Kanzonoj de la bonŝanco ĉe la festivalo de Bari; 23-I, Kuriero de Esperanto; 25-I, Survoje al Damasko; 29-I, Giuseppe Verdi; 30-I, Kuriero de Esperanto.

Skribu tuj pōstkarton

al nia oficejo, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando, por mendi libreton kun atestiloj de Apogantoj!

Ni senprokraste sendos ĝin al vi per registrita letero kaj ni debetos vian konton per ĝia valoro, sed *vi pagos nenion*.

Ricevinte ĝin vi bonvolu atente legi la instrukciojn sur la kovrilaj paĝoj de la libreto. Modelo de atestilo troviĝas en tiu ĉi numero de la Revuo. Kiam vi varbas Apoganton, vi plenigu kaj detranĉu la dekstran parton kaj vi donu ĝin kiel kvitancon al la varbita, kiu pagos al vi unufoje en la viva kotizon de Apoganto sumantan en la diverslandaj valutoj: 40 arg. pesos; 10 angl. ŝil.; 40 aŭstraj ŝil.; 70 belgaj fr.; 60 braz. kruz.;

10 danaj kr.; 300 finn. mk.; 500 fr. fr.; 6 germ. mk.; 50 hisp. pes.; 25 isl. kr.; 1000 it. lir.; 2 izr. p.; 500 jap. jen.; 500 jug. din.; 2 kan. dol.; 5 n. gld.; 10 norv. kr.; 50 port. esk.; 10 sv. kr.; 5 sv. fr.; 5 ur. pes.; 2 us. dol.; 5 ven. bol.

La maldekstran parton vi plenigu, sed ĝin vi lasu en la libreto. Post varbado de 10 Apogantoj, restos do al vi la kovrilo de la libreto enhavanta 10 maldekstrajn slipetojn, dum vi estos enkasiginta dekfoje la suprenomitan kotizon de Apoganto. Tiun sumon vi bonvolu tuj pagi la U.E.A. pere de via landa asocio aŭ ĉefdelegito, per ĉeko aŭ poŝtmandato aŭ iel ajn, laŭ la eblecoj de via lando, tiel ke ni povos krediti vian konton per la koncerna sumo.

Samtempe vi resendu la kovrilon kun maldekstraj slipetoj al nia oficejo.

Estas klare, ke vi mem nenion riskas. Vi nur estu sindona varbanto. Se malgraŭ ĉiuj klopodoj vi ne sukcesos varbi dek Apogantojn, sed ekz. nur sep, vi rajtos resendi la libreton ankaŭ kun la tri restintaj atestiloj kaj 7 kotizoj, sed principe ĉiu klopodu disvendi ĉiujn dek atestilojn.

Resendinte dek malplenajn libretojn, nome, varbinte 100 Apogantojn, *vi ricevos librodonacon en la valoro de 50.— n. gld. laŭ via elekto el la librolisto de U.E.A.!*

Oni ofte diras ke la esperantistoj ne estas riĉaj homoj. Tial ni ne petas de vi monon sur tiu ĉi loko. Oni ofte diras ke la esperantistoj estas sindonemaj homoj. Tial ni petas de vi nun tie ĉi nur sindonon!

M. H. VERMAAS,
Administranto.

Jen specimena atestilo:

<p>N^o 1878</p> <p>Lando: _____</p> <p>Urbo: _____</p> <p style="text-align: center;">A P O G A N T O</p> <p>Familia Nomo: _____</p> <p>Persona Nomo: _____</p> <p>Adreso: _____</p> <p>Profesio: _____</p> <p>Kotizo de _____ (en pagita valuto)</p> <p>Skribu ĉion per presliteroj)</p> <p style="text-align: center;">Ĉi tiun parton resendi al: UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO Eendrachtsweg 7 - Rotterdam-C. - Nederlando</p>	<p style="writing-mode: vertical-rl; transform: rotate(180deg);">Fortranĉu ĉi tie kaj donu la Atestilon al Apoganto</p>	<p style="text-align: center;">UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO (En Konsultaj Arangoj kun U. N. E. S. C. O.) Eendrachtsweg 7 - Rotterdam-C. - Nederlando</p> <p style="text-align: center;">A T E S T I L O</p> <p>S-ro _____</p> <p>S-ino _____</p> <p>F-ino _____</p> <p>El (urbo): _____</p> <p>Adreso: _____</p> <p>estas Apoganto de U.E.A.</p> <p>Kotizo de _____ pagita</p> <p>Dato: _____</p> <p>Subskribo de la persono al kiu la kotizo estas pagita: _____</p> <p style="text-align: right;">M. H. VERMAAS. Administranto.</p>
---	---	--

CED

Centro de Esploro
kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo.
Telefono ARNold 90-81

UEA KOMISIITA GVIDI SUBGRUPON DE NRO DE UNESKO

La 3-an de oktobro okazis en la UNESKO-Domo la kvara kunveno de la Laborgrupo de ne-registaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UNESKO. La kunveno pritraktis la problemon de

edukado al internaciaj kompreniĝo kaj kooperado. La reprezentanto de UEA ĉe tiu kunveno estis s-ro Jean Thierry, prezidanto de la Pariza Grupo, kiu ricevis de UEA ĉiujn necesajn informojn kaj dokumentojn. La kunveno formis 4 subgrupojn por studi la diversajn aspektojn de la problemo. La unua subgrupo okupiĝos pri la psikologiaj kaj sociologiaj fundamentoj de la internaciaj kompreniĝo kaj kooperado. Kiel gvidanto de tiu subgrupo estas elektita la reprezentanto de UEA s-ro Jean Thierry. La subgrupo, kompreneble, studos ankaŭ la lingvan problemon kiel unu el la ĉefaj obstakloj al la internaciaj kompreniĝo kaj kooperado. UEA liveros al la subgrupo, pere de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, la necesajn dokumentajn materialojn.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de decembro 1956

N-ro 289.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de novembro kaj ankaŭ por komparo, je la fino de novembro 1955:

	1955	1956
Asociaj membroj	11554	16178
Individuaj membroj		
MJ	981	952
MA	3991	4393
MS	829	737
Pat.	9	9
DM	295	293
HM	58	54
	<u>6163</u>	<u>6438</u>
	17717	22616

DELEGITOJ

Argentino
Buenos Aires D: S-ro Jorge Hess, Mekanikisto, Tupac-Amarú 1132.

Brazilo
Florianópolis (Santa Catarina) D: S-ro Giovanni P. Faraco, publika oficisto, Caixa postal 377, Rua Trajano 13, sob. FD. (Statistiko): La D.
Rio de Janeiro FD. (Radio): S-ro Jorge Soares das Neves, bankoficisto, Avenida Nova Iorque 35 — ap. 201, Bon-sucesso.

Ĉeĥoslovakujo
Jihlava (Moravio) FD (Arhitekturo): S-ro Jaroslav Huda, arhitekto, Brněnská č. 16.
Martín (Slovensko) FD (Medicino): D-ro Ljudo Izák, ftizeologo, Gottwaldova 12.
Vlastějovice (Ĉeĥy) D: S-ro Erhard Urban, eks-ĉefkelnero, Vlastějovice 47, Ĉeĥy.

Etiopio
Addis Ababa D: D-ro Ivo Borovečki, kuracisto, P.O. Box 1452.
FD (Medicino): La D.

Francujo
Bar-le-Duc (Meuse) D: S-ro Pol Denis, instruisto, Chemin de Blamecourt.
Montelimar (Drôme) D: S-ro Robert Llorens, profesoro, „La Verda Stelo”, Route de Châteauneuf.
Quimper (Finistère) D: Vakas.

Germanujo
Hagen (Westfalen) FD (Komerco): Vakas.
Rendsburg (Schleswig-Holstein) D: Vakas.
FD (Bestproduktado): Vakas.

Hispanujo
Palma de Mallorca (Balears) FD (Aeronaŭtiko): S-ro Jose Maria Lobato Penalver, aeronaŭtika inĝeniero

asistanto, Pabellon de oficiale de son San Juan.
Valencia FD (Katolikismo): S-ro Jaime Juan Forné, asekuroficisto, Taquígrafo Martí 3.

Indonezio
Bandung (Djawa Barat) FD (Junularo): S-ro Didi Kartaatmadja, lernanto de instruistlernejo, Djl. Rasdan 119/94.

Italujo
Fano (Marche) D: Vakas.
Milano (Lombardia) FD (Junularo): S-ro Enrico Paoli, reprezentanto, Via Brioschi 100.
Torino FD (Numismatiko): D-ro Vittorio Canavero, jura doktoro, Via Nizza 48.

Jugoslavujo
Ljubljana FD (Arkeologio): S-ro Marinko Gjiwoje, oficisto, Gornji trg. 31/II.

Kanado
Port Sydney (Ontario) D: Vakas.
FD (Unitarismo): Vakas.
Port Washington B.C. (British Columbia) D: F-ino Frances Saville, muzikinstruistino, „Lusingando”.

Nederlando
Baarn (Utrecht) D: Vakas.
Katwijk (Z.H.) D: S-ro Hendrikus C. Luijke, librotenisto, Parklaan 233.
Leiden (Z.H.) D: S-ro Markus van de Kreeke, ŝtatoficisto, de Laar de Kanterstraat 29.
VD: Vakas.
Vierlingsbeek (N.Br.) D: S-ro Leonard de Lang Evertsen, pensionita komunum-sekretario, Vierlingsbeek A69.

Pollando
Myszków (voj. Katowickie) D: S-ro Roman Taczewski, oficisto, ul. Kra-sickiego 25.
Radom (Kieleckie) FD (Stonkonstruado): S-ro Henryk Dabrowski, studento de politekniko, str. Gen. Swierczewskiego 50/11.

Warszawa FD (Ekonomio): S-ro Jerzy Mażys, librotenisto, ul. Wiktorska 83/87-33.

Sarlando.
Bildstock D: S-ro Werner Lindemann, Administra Oficisto, Trenkelbachstr. 24.

Sicraleono
Gandorhun (S.L. Protectorale) D: Vakas.

Svedujo
Arboga (Västmanland) D: S-ro Sten Almkvist, Gisestro, Tallgatan 3.
Bromma (Stockholm) D: Vakas.
Haverövalen (Medelpad) D: S-ro Carl Viksten, ĉefinspektoro, Munkestad.
FD (Rotario): La D.
Linköping (Östergötlands län) FD (Vojoj): Vakas.

Östervåla (Västmanlands) D: Vakas.
Strängnäs (Södermanland) D: S-ro Ragnar Elofsson, fervojisto, Tingstugatan 45A.
Varnhem (Västergötland) FD (Vegetarismo): F-ino Sigbritt Therner, instruistino, Kosmos Feriehem.

Svislando.
Bellinzona (Ticino) D: S-ro Giovanni Sasselini, Lokomotivestro, casa „la panna”, Arbedo.
VD: S-ro Kurt Greutert, Lokomotivestro, Via Lugano 16.
FD (Fervojoj aferoj): La D.
Elgg (Zürich) D: S-ro Antonio Pellanda, Komerco, Bahnhofstrasse 395.
FD (Blindulaj aferoj): La D.

Emmenbrücke (Luzern) D: S-ro Paul Scherer, Maŝindeseĝnisto, Riffgstrasse 60.
Genève FD (Lako-tekniko): S-ro Marcel Morteillon, Lak-teknisto, Rue du Beulet 6.

Kaltbrunn-Benken (St. Gallen) D: S-ro Peter Jud, inĝeniero elektrotekniko, Eden.
FD (Astronomio): La D.
Locarno-Brione (Ticino) D: S-ro Etienne Minod, ĝardenisto, Brione s/M, p. Locarno.

FD (Ĝardenkulturo): La D.
Muri (Aargau) D: S-ro Willi Frey, sukerajisto, Zurlaubenstrasse.
Winterthur (Zürich) FD (Koopertivaj aferoj): S-ro Hans Mosimann, Oficisto, Wülflingerstrasse 137, Winterthur 8.
FD (Tipografiaj aferoj): S-ro Josef Seeger, Korektisto, Baumschulstrasse 16.
Zürich VD: S-ro Werner Laederach, dipl. asekuroficisto, Kungenmatt 31, Zürich 55.
FD (Turismo): S-ro Heinz Sandmeier, Konduktoro, Gloriasteig 5.

Turkujo
Eskişehir D: S-ro Muhsin Yürük, Tajloro, 2 Eylül Caddesi 81.

NOVA KOMITATANO

Törnskog, S-ro Harry, Box 52, Alvsjö, Svedujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1956

734 Borges dos Santos, S-ro M., Curitiba, Brazilo.
735 Andersson, S-ro Arne, Alingsås, Svedujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1957

2. Sato, D-ro J., Buenos Aires, Argentino.
3. Nielsen, S-ro Benny, Kopenhago Valby, Danlando.
4. Svane, S-ro E., Charlottenlund, Danlando.
5. Dedieu, F-ino Jeanne, Toulouse, Francujo.
6. Minnaja, S-ro Luigi, Roma, Italujo.
7. Sjöberg, S-ro Helge, Gnosjö, Svedujo.
8. Tobusch, S-ro Herman, Chicago 2, Usono.
9. Laverman, F-ino A. A. Leeuwarden, Nederlando.
10. Lamberts, S-ro V., Bruxelles, Belgujo.
11. Coutinho, D-ro L. de Azeredo, Belo Horizonte, Brazilo.
12. Cauvin, S-ro J. M., Neuilly-St. Front, Francujo.
13. Guillaume, S-ro J., Le Vesinet, Francujo.
14. Hulin, S-ro, Honfleur, Francujo.
15. Marmou, Frato René Jean, La Housaye en Brie, Francujo.
16. May, S-ro J., St. Wendel, Francujo.
17. Pauvrehomme, S-ro Louis, Le Rest-les-Eaux, Var, Francujo.
18. Aproso, S-ro E., Torino, Italujo.
19. Bonomi, D-ro Paolo, Verona, Italio.
20. Boscarino, S-ro Avv. G. S., Ragusa, Italujo.
21. Dragoni Truffo, S-ino Prof-ino C., Torino, Italujo.
22. Giroldi, F-ino Adelaide, Torino, Italujo.
23. Vaona, D-ro Attilio, Torino, Italjo.
24. Lapenna, S-ino Emilija, Zagreb, Jugoslavujo.
25. Nikolajevic, S-ro Ante, Beograd, Jugoslavujo.
26. Cool, S-ro G., De Bilt, Nederlando.
27. Delden Szn., S-ro Mr. P. van, Deventer, Nederlando.
28. Douma, F-ino J. S., Deventer, Nederlando.
29. Dijk, S-ro Johan Pieter van, Oosterland, Nederlando.
30. Geyer, S-ro C. J., Bilthoven, Nederlando.
31. Holleman, S-ro J. V., Groningen, Nederlando.
32. Muller Jr., S-ro J. L. Bussum, Nederlando.
33. Ouwehand, S-ro D., Den Haag, Nederlando.
34. Ravestein-Basters, S-ino, J. M., Den Haag, Nederlando.
35. Roelofs, S-ro J. J., Baarn, Nederlando.
36. Roelofs, D-ro Willem P., Soest, Nederlando.

37. Slot, S-ro R., Zeist, Nederlando.
38. Antunes, S-ro J., Lisboa, Portugalujo.
39. Serra, D-ro P., Aveiro, Portugalujo.
40. Johansson, F-ino Ethel, Hedemora, Svedujo.
41. Möllestod, S-ro Sven, Kramfors, Svedujo.
42. Geerincq, S-ro P. René, St. Niklaas, Belgujo.
43. Beaumont, S-ro B. B., Huddersfield, Britujo.
44. Bluett, S-ro T. L. C., Truro, Britujo.
45. Bowell, F-ino Barbara, Bristol, Britujo.
46. Broadway, S-ro B. J. Bournemouth, Britujo.
47. Clarke, S-ro W., Dunfermline, Britujo.
48. Dunbar, S-ro Robert, London, Britujo.
49. Francis, S-ro R., Gravesend, Britujo.
50. Gardner, S-ro C. W., Sheffield, Britujo.
51. Hughes, S-ro A. J. L., Richmond, Britujo.
52. Ingham, S-ro H., Liverpool, Britujo.
53. Kennedy, S-ro D., Bishop Auckland, Britujo.
54. Kennedy, S-ino M., Bishop Auckland, Britujo.
55. Knight, S-ino E. B., London, Britujo.
56. Miller, S-ro J. R., Stone, Britujo.
57. Murray, S-ro R., Thorpe Bay, Britujo.
58. Pearson, F-ino E. M., York, Britujo.
59. Pearson, S-ro M., Sheffield, Britujo.
60. Phelan, S-ro H. K., Old Bexley, Britujo.
61. Prince, S-ro A., Letchworth, Britujo.
62. Zeiner, S-ro B. R., Barry, Britujo.
63. Jahn, S-ro C. J., Brønshøj-København, Danlando.
64. Henning Olsen, S-ro E., Glostrup, Danlando.
65. Broise, S-ro Auguste, Longué, Francujo.
66. Faulque, S-ro M., Cholet, Francujo.
67. Maillard, D-ro G., Bourg-la-Reine, Francujo.
68. Vautrin, S-ro Jean, Paris, Francujo.
69. Alsina, S-ro Fr., Barcelona, Hispanujo.
70. Maurel, S-ro S., Barcelona, Hispanujo.
71. Blöndal, S-ro Björn P., Hvammstanga, Islando.
72. Petrovic, Prof. Svetislav S., Pirot, Jugoslavujo.
73. Roberts, S-ro Ch. W., Rose Valley, Kanado.
74. Boer, S-ro Dick de, Den Haag, Nederlando.
75. Pannenburg, S-ro R., Nieuwe-Pekela, Nederlando.
76. Rees van den Ende, S-ino I. A. J. M., Rotterdam, Nederlando.
77. Zorgdrager, F-ino Corn., Vlissingen, Nederlando.
78. Caspary, S-ro H., Oslo, Norvegujo.
79. Falch, S-ro Aage, Kragerø, Norvegujo.
80. Jensson, S-ro Arnfinn, Oslo, Norvegujo.
81. Norvall, S-ro Knut, Olso, Norvegujo.

82. Støp-Bowitz, S-ro C., Oslo Norvegujo.
83. Feis, S-ro Günter, Altenwald, Sarlando.
84. Ahlin, S-ro E. V., Brovallen, Svedujo.
85. Blid, S-ro A., Nynäshamn, Svedujo.
86. Cooper, S-ro B., Boras, Svedujo.
87. Ekholm, F-ino Anna, Boden, Svedujo.
88. Emson, S-ino Regina, Boras, Svedujo.
89. Eriksson, S-ro Bernhard, Stockholm, Svedujo.
90. Frode, S-ro O., Göteborg, Svedujo.

PATRONO 1957

1 Zollinger, S-ro R., La Chaux-de-Fonds, Svislando.

TESTAMENTAJO

S-ro V. V. Sumfield la delegito por Eastbourne Anglujo kaj presisto de „Esperanto Internacia” kaj „Esperanto” dum multaj jaroj, testamentis al la Asocio £ 250 kiun ni danke ricevis.

M. H. VERMAAS,
Administranto

DANKON

Okaze de nia eksigo el la estraro de UEA multaj amikoj kontribuis por montri al ni sian bonvolon per honora donaco. Ni varme kaj sincere dankas pro tiu gentila gesto. La donaco ĉiam memorigos nin pri niaj amikoj tra la tuta mondo.

Tre kore
viaj amikoj
E. Malmgren D. Kennedy

ESPERANTO

Ni disponas pri tre limigita kvanto de kompletaj binditaj jarkolektoj 1956

Prezo: por membroj 4,— gld.
„ nemembroj 8,— gld.
Mendu tuj ĉe U.E.A.!

Binditaj jarkolektoj de malnovaj jaroj

1951-52 por membroj 1,50 gld.
por nemembroj 3,— gld.
1953-55 por membroj 3,— gld.
por nemembroj 6,— gld.

(la membreco rilatas al la koncerna jaro).

Kompletigu vian serion!

Nur tre malgranda estas ankoraŭ nia provizo.

Mendu tuj ĉe U.E.A.!

Kongreslanda Branco de la B.K. 1957

Por akceli la kulturperadon al la kongreslando, ĉiokaze al Francujo, ni anoncas konkurson por traduko el la franca lingvo en Esperanton. La tasko de la konkursantoj (ne devas esti nur francoj) estas la traduko de la „Himno al la Suno“ el la teatraĵo „Chanteclair“ de Edmond Rostand. La komencaj vortoj estas:

„Toi qui sèches les pleurs des moindres graminées...“ kaj de tiu komenco estas tradukendaj ok strofoj.

La konkursajojn sendu, kiel en ĉiuj branĉoj, al la peranto, s-ro K. Lawrence, 244 Quinton Rd. Birmingham 27 (Anglujo) en 6 ekzempleroj. Ne ensendu la originalan tekston. Bonvolu aranĝi la konkursajojn laŭ la reguloj de la ceteraj branĉoj.

En tiu ĉi branĉo la templimo por la ensendo, t.e. al la alveno de la konkursajoj estas *la 1-a de majo, 1957.*

ANONCETOJ

Ne multaj libroj aperintaj dum la lastaj jaroj havis tian sanigan influon al nia lingvo kiel „**Du Malsanoj en Esperanto**“ de H. A. de Hoog. Tial ĉiu esperantisto havanta lingvan ambicion kaj amon al Esperanto legu ĝin. Havebla rekte de la eldoninto aŭ de via nacia Esperanta eldonejo aŭ de la libroservo de U.E.A. Prezo sv. kronoj 4,40 inkl. sendkostojn. Erik Carlén, Hällabrottet, Svedujo, Poŝtĝiro 34 34 81.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 s 6 p por ĉiu nokto. Prezoj malaltigas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. A. Bytheway, „Flat Four“, 1 Warrington Crescent, LONDON W.9, Anglujo, Telefono CUNningham 4487.

Koresponda Servo Mondskala havigas korespondantojn el pli ol 30 landoj laŭ dezire. Skribu, indikante vian aĝon kaj aldonante respondkuponon al: Daniel LUEZ, Boulevard Brossolette, LAON (Aisne), Francujo. Naciaj Esperanto-gazetoj bonvolu afable represi tiun ĉi anonceton.

26-jara svedo deziras korespondi tutmonde. S-ro Gunnar Nilsson, Allén 2002, SKÖVDE, Svedujo.

Deziras korespondadon tutmondan, respondos kun dediĉita donaclibreto s-ino Göta Palm, Traktörsgatan 6, HÄLSINGBORG, Svedujo.

Deziras korespondi tutmonde, interŝanĝi fotojn, poŝtmarkojn ktp. Respondo garantiata! Ewald Wünschel, 21-jara, Leimersheim/Pfalz, Germanujo.

Letervesperon aranĝos la Esperantoklaso de elementa lernejo en la komenco de marto 1957. Ĉiu ricevos respondon.

Skribu multnombre al Eberhard Schneider, instruisto, Langenbergsschule, (21a) BOCHOLT, Diepenbrockstrasse, Germanujo.

Deziregas gekorespondantojn 80 knaboj. S-ro F. B. Hotchkiss, Elleston Secondary School, Cleethorpes, Lincolnshire, Anglujo.

Por vi, kiuj vizitos la Kongreson de MARSEILLE, la „Esperantista Kulturdomo“ organizas aŭtobusan karavanon: TRA NIA BELA FRANCUJO; de la 29-7 ĝis 16-8, Parizo, Chartres, Grésillon, Poitiers, Périgueux, Rocamadour, Padirac, la fama krutega Tarn-valo, Cevennes, Nimes, Camargue, Arles, Marseille, ... ekskurso laŭ Lazura Marbordo, ... Aix, Avignon, Orange, Rhône-valo, Vercors, Ardèche-valo, Le Puy kaj la tuta Auvergne, Orléans, Parizo; ĉirkaŭa prezo: 35.000 fr. Pliajn informojn kontraŭ resp. kup. al S-ro Delagneau, Avrolles par St. Florentin, Yonne (France).

Gejunuloj de Junulara Esperanto-Grupo. - Via S. Nazzaro 1 - Verona (Italio) - lernantaj Esperanton ĉe Scuola Media Statale „Amedeo di Savoia-Aosta“ petas, ke oni skribu al ili ĉiuteme per ilustritaj poŝtkartoj kaj leteroj. Nepre respondos.

50 geesperantistoj en Jihlava (ĈSR) deziras korespondi pri ĉiuj seriozaj temoj kun geamikoj en la tuta mondo. Adreso: Esperantista Klubo, Jihlava, ĈSR.

Inĝenieroj, arĥitektoj, konstruistoj! Proponu vian intelekton por krei internacian unuigon de arĥitektoj kun komuna presorgano en Esperanto! Sendu viajn adresojn, stimulaĵojn kaj publikeblan materialon al: Esperantista Klubo, Jihlava, ĈSR.

Nia grupo estas invitata aranĝi Esperantan tuttagan manifestacion en kadro de Bolonja Internacia Foiro okazonta 8-22 majo 1957. Ni petegas sendi el tuta mondo materialon por ekspozicio precipe rilate aplikadon Esperanto al industrio kaj komerco, specialaj temoj de la manifestacio, al: Grupo Esperantista, Rolandino 4, Bologna, Italujo. Okazos samtempe „amikceffesto“, sekve balotataj estos „amikceaj donacoj“ por ĉiuj ĉeestantaj eksterlandanoj.

Mi deziras korespondi pri filatelio kaj ŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Zlatko Vidmar, Vlaška 102, ZAGREB, Jugoslavio.

Ĉeĥa eksperto de la tibeta lingvo serĉas kian ajn eksterlandan financsubtenon por lingvoesplora ekspedicio en Tibeton. Naciaj gazetoj bonvolu afable represi tiun ĉi anonceton. Postulu detalan informon al inĝ. K. K. Sedláček, Prostějov, Kostelecá 11, Ĉeĥoslovakujo.

Manoel Borges dos Santos (Dokito) deziras gekorespondamikojn en la tuta mondo. Nepre respondos. Adreso: M. Borges dos Santos, Strato Castro Alves 13, Muritiba, Bahia, Brazilo.

Nova adreso: Franc Franjiĉ; Stranieri, Caserma Vittorio Eman. II, GAETA, Italio.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
kun kunlaborado de
la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - posformato
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta
konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj
landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: Administracio:
7, Av. Léon-Gourdaul 5. Bd. Stalingrad
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
Francujo.

Karaj Legantoj!

PAGU TUJ VIAN KOTIZON 1957

★

por ke vi ne havu konscienc-
riproĉon malfermante novan
numeron de la revuo... kaj por
ke vi faciligu la laboron de nia
oficejo! Koran dankon anticipe.

Bindigu vian jarkolekton

Ni liveras apartajn bindaĵojn en
plaĉa verda tolo por la nuna for-
mato de la Revuo.

Mendu tuj ĉe U.E.A.

Prezo: 2,50 gld. — 10 steloj.

VAGADO SUB PALMOJ

La streĉe interesaj dezertaj
vojaĝimpresoj de

JEAN RIBILLARD
aperintaj en „Esperanto“

★ Nun en formo de libro!

Prezo: 2,50 gld.; 10 steloj

Mendu ĉe U.E.A.!

Stafeta

Kiam ĝi eldonis la unuan libron, oni diris: „Estas neeble eldoni tiel belan, grandan libron je tiu prezo!”

Kiam eliris la dua, oni diris: „Tio ne povas daŭri”.

Kaj sekvis, ne unu, sed du libroj — samtempe!

Kaj solide, regule, la serio daŭras.

Kial?

Ĉar la Esperanta publiko estas inteligenta kaj ŝatas la belon.

Ĝi spertis, ke STAFETO liveras en luksa vesto absorban legajon de plej alta kvalito per tre modera prezo.

Vidu mem!

1. *Kvaropo*. Poemoj de Auld, Dinwoodie, Francis, Rossetti (Elĉerpita).
2. *La bapto de caro Vladimir*. Havliček, tradukis Pumpr. Brila vers-satiro, ĉiam aktuala, kun 52 originalaj ilustraĵoj de Josef Lada (Preskaŭ elĉerpita!)
3. *El la maniko*. Bonhumoraj noveloj de Reto Rossetti.
4. *Koko krias jam!* La plej grava novelaro de Ferenc Szilágyi.
5. *Kontralte*. Poemaro de Marjorie Boulton, kiu ĉie vekis entuziasmon.
6. *Eseoj I. Beletro*, de Gaston Waringhien. Riĉa regalo de penso, klero kaj bonhumoro.
7. *La infana raso*, de William Auld. Grandioza pionira poemo en 25 ĉapitroj, kun 5 ilustraĵoj de Pierre Lavallo.
8. (Nun presata) *La floroj de l' malbono*, de Charles Baudelaire, tradukita de K. Kalocsay kaj G. Waringhien. Monda literatura evento. Plej alta pinto de nia traduka poezio.

Sekvos Antologio de la Esperanta Poezio en redakto de W. Auld, kaj kelkaj valoraj manuskriptoj, kies eldoniĝon garantias via subteno.

Belliteratura



eldonserio

La librojn liveras la eldonisto, UEA kaj ĉiuj gravaj centroj de la Movado

HELPU PLUPORTI LA TORĈON!

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1956

Stato je la 30-a de novembro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Jugoslavujo	2629	3563	135,53
2.	Italujo	3025	3620	119,67
3.	Hispanujo	1825	2092	114,63
4.	Franĉujo	5869	6460	110,07
5.	Svislando	1740	1890	108,62
6.	Brazilo	6820	6825	100,07
7.	Svedujo	6893	6885	99,88
8.	Britujo	7608	7351	96,62
9.	Nederlando	5074	4894	96,45
10.	Finnlando	2872	2685	93,49
11.	Germanujo	6986	6505	93,11
12.	Belgujo	2135	1949	91,29
13.	Norvegujo	2318	1978	85,33
14.	Danlando	2765	1905	68,90
15.	Usono	3352	1991	59,40

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Kanado	345	500	144,93
2.	Islando	330	405	122,72
3.	Portugalujo	495	580	117,17
4.	Maroko	937	1061	113,23
5.	Japanujo	1182	1210	102,37
6.	Urugvajo	330	325	98,48
7.	Izraelo	300	290	96,66
8.	Aŭstralio	1145	1025	89,52
9.	Nov-Zelando	854	745	87,24
10.	Sudafriko	305	230	75,41
11.	Aŭstrujo	1485	1000	67,33
12.	Meksikio	250	120	48,—
13.	Irlando	250	55	22,—

La Kampanjo de la jaro:

Ĉiu kunlaboru en la varbado de apogantoj!

Kroatia Esperanto Ligo eldonis libreton:

TEATRO EN SOCIETO

Aŭtoroj: E. Lapenna, M. Mamuzič, S. Mulo.
Mallongaj originalaj teatraĵoj ludeblaj en societejoj, distre-karakteraj.

Scenejo, kulisoj, teatraĵoj kostumoj nebezonaĵoj.
Konvena helpilo en laboro kun gejunuloj.
Programeroj por Zamenhofaj-vesperoj.
Legajo por konversaciaj kursoj.

Prezo: en Jugoslavio 120 Din, en eksterlando 2 ned. guldenoj.

MENDU ĈE UEA

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam